


# pola esperantisto

socikultura revuo de  
polaj esperantistoj

Fondita en 1906 • N-ro 3/2004 • ISSN 0032-2431



3

2004

# Enhavtabelo:

3 REDAKTORE – Kazimierz Leja

---

## PERSONE

4-5 Intervjuo de S. Mandrak kun Jan Stanisław Skorupski.

---

## TRA LA MONDO

9 Gazetaraj informoj: Renato Corsetti proponata por dua mandato kiel prezidanto de UEA.

11 „Libera Folio”: Zlatko Tišljar pri elektoj en UEA.

12 Renato Corsetti: Por ke lingvo estu intertriba...

13 Hans Bakker: Vigla klubo en Afriko.

14-22 Aliaj primovadaj informoj.

---

## LINGVA ANGULETO

23 Czesław Baranowski: Preskaŭ ĉio pri la prepozicio ĜIS.

---

## POLLANDO

25-34 Diversaj primovadaj informoj, raporto kaj leteroj.

---

## LITERATURO

35 Efraim Kišon: La simpla prirabo de banko.

*Kovrilpaĝe: Manuskriptoj de freŝaj sonetoj de J.S.Skorupski.*

pola  
esperantisto

Socikultura revuo de polaj esperantistoj, aperas 6 fojojn jare. Eldonas: Eldonejo HEJME • <http://www.hejme.e-tools.pl> • Redaktoro: Kazimierz LEJA.

**Ĉiujn korespondadojn kaj kontribuojn sendu nur al la redaktoro:**

**PL 41-250 Czeladź, skrytka 59; retpoŝto: [esperanto@hejme.e-tools.pl](mailto:esperanto@hejme.e-tools.pl).  
tel: (+48 32) 265 00 38**

Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al:

BRE Bank SA-mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644.

Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda al:

UEA-konto: <kazl-s> aŭ FEL-konto: <leja-t>

N-ro 3/2004 • ISSN 0032-2431 • Eldonkvanto: 250 ekz.

*Kazimierz Leja*

Karaj geamikoj, alproksimiĝas libertempa periodo, kio videblas ĉirkaŭ ni. Multaj el ni baldaŭ povos ripozi, kelkaj partoprenos diversajn esperantistajn aranĝojn. Al ĉiuj mi deziras bonan tempon kaj vere esperantistan etoson. Memoru, ke aliaj esperantistoj volonte tralegos viajn raportojn, rimarkojn, kiuj ĉiam instigas por propra, pli aktiva agado. Speciale tiuj, kiuj devas resti en sia loĝloko, por kiuj vojaĝoj kaj partoprenkostoj estas daŭre tro altaj...

En la kuranta numero de *PE* vi trovos pli da tekstoj pri la aferoj primovadaj, pri kiuj multaj legantoj petis (mi jam vidas tamen la liston de protestantaj legantoj...). La kajero komenciĝas per intervjuo kun interesa homo, esperantisto, Guinness-rekordulo surkampe de poezio. Ne mankas ankaŭ *Lingva Anguleto*, kies redaktoro plene sindediĉas, por ke nia lingvaĵo estu pura kaj perfekta.

En la sekvaj ĉi-jaraj numeroj vi trovos pli da tekstoj senditaj de niaj legantoj, inter ili pri Stalin kaj Esperanto, ankaŭ proprajn tradukojn kaj tekstojn originale verkitaĵojn en Esperanto. Denove en oktobra numero revenos historio kaj pli „pezaj” temoj, pri kiuj *tiom ofte mi aŭdas protestojn*.

Pollando eniris la Eŭropan Union.

Kiam mi skribas ĉi-vortojn, restis kelkaj tagoj antaŭ elektoj de deputitoj por Eŭropa Parlamento. Inter polaj kandidatoj troviĝas du geesperantistoj, ne mankas ankaŭ kandidatoj-esperantistoj en aliaj eŭropaj landoj. Al ĉiuj ni deziras sukcesojn kaj elekton.

Alproksimiĝas ankaŭ balotado ene de UEA. Ĝi okazos en malproksima de ni lando kaj kontinento, tamen ties rezultoj decidis pri sekvaj 3 jaroj de nia kunekzistado. Ĉu la nova estraro *revenos*, simile al tiu de PEA?

***Fine, mi volas proponi al ĉiuj Esperanto-organizoj, agantaj en Polando: sur la paĝoj de PE ekde nun estas loko por viaj aŭtoraj, propraj paĝoj. En ĉiu numero de la revuo vi ĉiuj povos uzi 2 paĝojn (aŭ pli, laŭ interkonsento). Via rolo estas akcepti la proponon kaj mem redakti la enhavon. Pri la teknikaj detaloj bonvolu kontakti min retroŝte, sufiĉe frue. Tiamaniere neniu povos diri estonte, ke ne havis ŝancon. Kaj eble tio igos PE pli komuna afero.***

Viaj opinioj pri la enhavo de *PE* estas ĉiam bonvenaj, kaj serioze traktataj. Nur unu peto: sendu ilin rekte al mi. Nur tio garantias, ke vi povas la enhavon influi. Mi ne ŝatas „onidirojn” kaj klaĉojn, kiuj lastatempe multiĝis.

via redaktoro

## PERSONE

---



**Jan Stanisław Skorupski** (\*18.07.1938 Podolio), pola poeto, kanzonisto kaj plastikisto, kiu studis kaj instruis plurajn fakojn, verkis multajn poemkolektojn (ekz. la plej grandan en la mondo ciklon de dekkelkaj miloj da sonetoj) kaj eseojn en la pola, germana kaj en Eo, kiuj estis tradukitaj kaj eldonitaj en multaj lingvoj kiel libroj, kompaktdiskoj kaj kasedoj; li gvidis teatrajn spektaklojn kaj literaturajn radioprogramojn (ekz. ĉe radio LoRa, Zuriko), redaktis doktoriĝajn laborojn kaj aranĝis respektivajn servojn laŭ la temoj pere de ĝustaj lektoroj en diversaj lingvoj, pritaksis la literaturan valoron de la verkoj, redaktis ilin kaj proponis al eldonistoj. Skorupski unu-

afoje malkovris Eo-n en 1959 kiam okazis la UK Varsovio kaj denove en 1972, kiam li velnavigadis ekologie tra Danubo, uzante la lingvon internacian.

### Soneto je desupra loko

trovinte *vivartenativon*  
mi veturadis tra Eŭropo  
al iu fora biotopo  
kie mi observadis vivon  
loĝante en etruska turo  
mi povis desupre rigardi  
kiel oni povas lombardi  
per kulturo kaj per naturo  
la sama aktuala leĝo  
subtenas ekstremajn aferojn  
pere de blasfemo aŭ preĝo  
gravas kiu sidas sur seĝo  
kaj kiujn prijuĝas li sferojn  
pledo degelas kiel neĝo

*Castellina Marittima,*  
*la 20an de aprilo 2004 JSS*

### Invito al duelo

Mi vokas al duelo lingva ĉiun parlamentanon de Eŭropa Unio aŭ lian respektindan reprezentanton, ekz. konatan verkiston aŭ scientiston, kiu asertas, ke Esperanto estas la lingvo sen kulturo, kaj la objekto de tiu ĉi intelekta duelo povus esti ĉiuj agoj ligitaj kun vortoj en esprimo de pensoj, ankaŭ en diversaj tradukoj de la patriana lingvo al ĉiu alia lingvo elektita kaj inverse — mi uzus en tiu ĉi duelo nur la lingvon Esperanto, akceptante ĉiujn kondiĉojn aliflankajn.

Mi esperas, ke por tiuj homoj „kun kulturo” ne mankos kuraĝo!

Zuriko, la 18an de majo 2004

**Jan Stanisław Skorupski**

## Intervjuo kun Jan Stanisław Skorupski

— poeto, kiu de multaj jaroj vivas en Svisujo, konata tutmonde dank' al sia multnombra verkado de sonetoj.

**Stanisław Mandrak: S-ro Stanisław kiam kaj kie Vi kontaktiĝis kun Esperanto?**

**Jan Stanisław Skorupski:** En la jaro 1959 aperis multe da informoj pri Jubilea Kongreso, kaj tio min interesiĝis, poste estis paŭzo kaj kiam ni preparadis ekologian velnavigan ekspedon sur Danubo en 1972, mi decidis sur tiu „virga” tereno provi Esperanton. Poste estis kursoj, sed pli frue mi iris al Jasna strato [kie estis iam sidejo de PEA — SM] peti, ke iu traduku mian libreton (gvidlibron tra Malnova Urbo de Varsovio). Unu el esperantistoj, s-ro Bolesław Staszczak reagis: „bonvolu skribi mem”, kaj tiel ĉio komenciĝis. Venis aliaj tempoj. Oni eldonis mian gvidlibreton jam post mia forveturo okcidenten en la formato de faldfolio. Mi vidas ĝin en diversaj landoj, kvankam mem mi ne posedas eĉ unu ekzempleron. Sen la helpo de Bolesław Staszczak mi ne preparus tiun verketon, sed dank' al tio mi lernis la lingvon.

**SM: Kion donis al Vi Esperanto?**

**JSS:** Multe. Ĉar mi tre ŝatas li-

beran vivon, dank' al Esperanto mi fariĝis plene libera persono, sen lingvaj kompleksoj. Mi parolas ne tro korekte en aliaj lingvoj. Se iu volis paroli korekte kun mi, mi tuj proponas al li Esperanton, kaj ĉi tio estas mia avantaĝo je aliaj personoj. Avantaĝo kaŭzata de mia ne tro bona regado en aliaj lingvoj. Daŭras tio ĝis hodiaŭ. Por mi Esperanto estas ankaŭ rimeado de mia arto. Mi staras en la teatro sur la scenejo kaj mi kantas esperante. Publiko reagis entuziasme, eĉ se en la teatro-salono troviĝas neniu esperantisto. Tiu ĉi mola bela lingvo plaĉas al ĉiuj (preskaŭ ĉiuj). Mi povus uzi Esperanton sen esperantistoj, nur pro la artaj valoroj de la lingvo.

**Ĉu laŭ Vi Esperanto estas utila, ĉu kiel oni diras ofte nur „hobio”, „utopio”?**

Ĝi estas tre utila. En Berlino ĉe Ortrudstrasse 5 kelkajn jarojn ĉiumarde je la horo 20.00 mi gvidis vesperojn en la galerio „pola arto”, ĝuste en Esperanto. Tradukis tion vigle Herman Tautorat (jam ne vivas — mi dediĉis al Li kelkajn sonetojn). Vesperoj okazis tre bona ludo. Mi havis ankaŭ prezentadojn en teatroj, kluboj — en diversaj urboj de Eŭropo (ne por esperantistoj) kaj ĉiam kun granda sukce-

so. Kun granda plezuro mi memoras tiujn tempojn. Esperanto estas ankaŭ por multaj hobiaj, kaj por aliaj utopio. Mi ankaŭ aliĝis (post multaj petoj) al Esperanta Civito. Sed kiel ununura senatano de EC mi ne konsentis ĵuri, ĉar laŭ mi ĝi aspektas iom sekte, kaj mi kun sektoj ne volas kunlabori. Ĝuste anoj de tiu grupo estas utopiistoj, vivas en sia propra mondo. Malforto de esperanta movado estas manko de malkaŝo al la vivo kaj al aliaj homoj („ne krokodilu”), malkaŝo por la mondproblemoj. En multaj esperantaj gazetoj oni skribas nur pri internaj (iluziaj) sukcesoj, ne pri ĉiutaga „malmola”, malfacila vivo.

**Iam „Teleekspres” en TVP informis, ke Vi skribis centojn (aŭ milojn) da sonetoj ankaŭ en Esperanto. Ĉu ni povus scii kiom da kaj kiam?**

Estas por mi malfacile laŭdi min mem. Sed ĝis nun mi ne havis malbonan recenzon pri miaj libroj (en diversaj lingvoj), kontraŭuloj volas silenti, ĉar ili ne trovas ĝustajn kontraŭargumentojn. Inaŭgurajn vesperojn de miaj libroj ĉiam gvidis famaj literaturistoj (Piotr Kuncewicz — prezidanto de la Asocio de Polaj Literaturistoj — 4-foje kaj aliaj). Mi ne donas intervjuojn (por vi mi faras escepton), ĉar en „fanfaronaj” biografioj estas malmulte da vero. Miajn versojn dum vesperoj legis meritaj aktoroj (Wojciech Siemion, Henryk Boukołowski, Hermann Ebeling (jam ne plu vivas) en Germanio, Helmut Vogel en Svislando kaj multaj aliaj). Miajn vespe-

rojn partoprenis polaj ŝtatestroj Wojciech Jaruzelski kaj Lech Wałęsa, ankaŭ episkopoj (inter ili pastro Jan Twardowski), meritaj literaturistoj kiel Wojciech Żukrowski, Andrzej Szczypiorski, reĝisoroj Andrzej Wajda, Izabela Cywińska (ministro pri kulturo), kaj ankaŭ alia ministro pri kulturo — Andrzej Zakrzewski. Partoprenis ankaŭ „oranga alternativo” kun sia „majoro” Waldemar Fydrych, verduloj, ruĝuloj, nigrujoj kaj aliaj koloroj... sed ĉi tio atestas pri nenio. Gravas valoro de la verko kaj ĝia legantaro. Ĉiuj miaj libroj estis venditaj („Polski czyściciel” — „Pola purgatorio” estis eldonita en 100.000 ekz. kaj mi ne havas eĉ unun). Rilate al tio ŝajnas esti ridindaj komunikaĵoj pri efektoj de la konkursoj, en kiuj la plej popularaj esperantaj libroj estis tralegitaj nur de 6 (ses) personoj. Nun mi eldonas malpli, sed mi skribas pli, mi ne havas eĉ tempon por tajpi. Mi kopias la manuskriptojn, verdire per skanilo.

Soneto estas la plej malfacila formo de poezio, kun tre preciza strukturo, kun densa enhavo kaj konkludo. Dufoje oni kalkulis miajn sonetojn por „Rekorda Librego de Guinness” — tion faris miaj kolegoj. Unua listo montras **732 sonetojn** en pola kaj Esperanto skribitaj dum unu jaro, dua **2928** kaj ampleksas periodon de 01.01.1995 ĝis 12.06.1997. De tiu tempo mi skribas ne malpli kaj oni povas facile ĉion kalkuli. **Nur en 1998 mi skribis 2004 sonetojn en du lingvoj, do entute 4008.** Mi donacos al vi du librojn kun miaj

sonetoj. Pli multe da rekordoj ne estos, ĉar mi ne havas jam por tio tempon. Mi tre ofte veturas tra la mondo, eĉ velnavige, ĉar por skribado oni bezonas temojn, kaj tiujn oni povas trovi survoje, konatiĝante kun aliaj homoj kaj kulturoj. Lastatempe mi denove estis en Venecio, kie mi malkovris polan korton (neniu gvidlibro skribas pri ĝi) SOTOPORTEGO E CORTE POLACCA.

### **Kion Vi opinias ĝenerale pri la Esperanto-literaturo?**

La Esperanto-literaturo disvolviĝis rapide jam de komenco, tio signifas de kelkaj unuaj verkoj de la **Kreinto**, iom poste de **Antoni Grabowski** kiel granda tradukisto, ĝis nuntempo — ĉiam en la historio de Esperanto estis verkistoj, kiuj lasis grandajn literaturajn spurojn, sed iliaj preskaŭ ĉiuj verkoj, de iam ĝis hodiaŭ, aspektas iom malmoderne, ni diru folklore, tamen tiu ĉi popola eco bonege atestas pri la utileco de la lingvo, ĉar tiamaniere ĝi estas vigla, ĝi estas uzata por ĉiutaga vivo. En tiu ĉi popoleco de la esperanta literaturo troviĝas ankaŭ danĝeroj, ke ĝi povus esti prenita de alilingvanoj kiel infaneca, malserioza, fermita nur por esperantistoj, malprogresiva kaj pro tio malinteresa por la kritikistoj, sciencistoj, ankaŭ por bonaj legantoj. Eksterordinaraj esceptoj estas verkoj de **Brendon Clark**, kiu estis majstro de moderneco en Esperanto (liaj tradukaĵoj de Shakespeare estas fenomenaj). Valore skribas ankaŭ nun **Mauro Nervi** kaj **Wolfgang Günther**


(konata kiel Lupiro), ambaŭ kapablas skribi tiel, ke en la nuntempa monda literaturo ili ne perdiĝus, kvankam estas grandegaj diferencoj inter ili. Ĉiuj aliaj estas folkloristoj, sed kial ne, folkloraj poetoj, al kiuj mi alkalkulas eĉ tiujn de „Literatura Foiro”, ankaŭ estas interesaj, sed ne por nuntempaj literaturamantoj. Por uzi la vorton „ĝenerale”, jes, ĝenerale la esperanta literaturo disvolviĝas rapide, bedaŭrinde, ne al la ĝusta direkto. Rimaĵojn por la onklino, okaze de ŝia naskiĝtago, oni povas ĉiam skribi, sed ĉu tiel ekestas granda literaturo? Komprenoble, mi ŝercas, mi respondas iom groteske, sciante, ke la vero kalumnias, kaj kalumnios certe la verkistoj, kiuj legos Vian intervjuon.

### **Sinjoro Stanisław ĉu Vi povus rakonti kelkvorte pri si mem?**

Poeto mi estas de mia nasktago. En la momento de mia naskiĝo pikilis min abelo. Mia avo tiam diris: „se li travivos, li estos poeto”. Li povis diri: „estos oficiro, kuracisto, advokato”, ĉar tio estis tiam profitaj profesioj, sed avo kategorie konstatis „li estos poeto”... kaj tiel okazis. Poezio multe helpis al mi, eĉ savis mian vivon. Tridek jarojn mi vivas en okcidento, kaj mi ne ŝanĝis mian polan civitanecon. Eble, se mi estus bakisto, kamenpurigisto, pavimisto, tiam mi ŝanĝus mian civitanecon, sed mi estas poeto. Kaj kia mi estas svisa poeto? Tamen mi ŝanĝis civitanecon, kiam Pollando ekkomencis partopreni en la milito en Irako; mi ne volas esti patrioto de patrujo, kiu postiras hontegajn kazojn de la histo-

rio (Santo Domingo, Saragossa ktp.).

Pri miaj du propraj nomoj Jan Stanisław mi jam skribis al vi. Oficiale mi estas Jan Stanisław, sed private same kiel vi — Stanisław. Kiam, vivante ankoraŭ en Pollando, venis la leteroj kun la nomo „Jan”, leterportisto ricevadis trinkmonon kaj skribis „adresa-to nekonata”. Ĉar leteroj kun tia nomo povis veni nur de Milicejo aŭ Soldatejo por soldataj ekzercoj. Miaj gepatroj, de mia naskiĝo vokis min „Staĉjo”. Nomon „Jan” mi ricevis de pastro Jan, kiu volis diferencigi min de alia Stanisław Skorupski, kiu mortis liberigante la urbon Kołobrzeg la 18an de marto 1945, kaj lian soldatan tombon oni povas tie trovi. Krom la komuna kun vi nomo, mi same kiel vi dum mallonga tempo portis la ministan uniformon [mi laboris dum dekkelkaj jaroj en karbominejo — SM].



Se temas pri Esperanto. Ĝi speciale ne diferencigas min de aliaj homoj. Mi sentas min normala homo kiel aliaj. Ĉiuj ĉirkaŭe nomas min Polo („der Pole”). Tio signifas, ke mia poleco estas mia diferencigilo, estas mia eco, eĉ profesio. Esperanto helpas en tio al mi. Mia poleco ne embarasigas min, ĉar mi konas Esperanton. Sed esti patrioto de nuna militeme usoniginta Pollando estas malfacila kaj maldolĉa afero. Mi ne ŝatas la vorton „patriotismo”, ĉar en niaj tempoj ĝi estas la sinonimo de naciismo. Do mi ne estas patrioto, kvankam ĉiuj nomas min Polo — oni povas diri, ke poleco estas mia profesio, ĉu tio povas esti perfideco? Mi subtenas bonajn ideojn, sed ne ideologiojn, kiuj estas kodeksoj por plenumi ilin sendiskute kaj nur unuflanke, tre ofte blinde jak ege danĝere, sendepende de la bonaj enhavo.

Nun mi verkas rekte al mia interreta paĝo: ĉiutage oni povas trovi novajn, freŝe skribitajn sonetojn aŭ aliajn poemojn kaj eseojn en tri lingvoj. La paĝoj estas tiel konstruitaj, ke oni povas facile korespondi pri koncernaj temoj.

Mi kore invitas!

[www.skorupski.com](http://www.skorupski.com)

\* Kiel protesto kontraŭ partopreno de Pollando en la milito en Irako Jan Stanisław Skorupski ŝanĝis civitanecon al la svisa kaj por oficialaj reprezentantoj de la pola ŝtato malpermesis partopreni en siaj spektakloj.



# Renato Corsetti proponata por dua mandato kiel prezidanto de UEA

La komitatanoj de UEA povas nun komenti konkretajn nomojn en siaj diskutoj pri la elektoj okazontaj en la Universala Kongreso en Pekino. Tion ebligas la konkluda raporto de la Elekta Komisiono, kiu prezentas la kandidatigojn por diversaj postenoj en la trijara periodo 2004–2007.

Pro malsaniĝo de la prezidanto de la Komisiono, s-ro Takeuti Yosikazu el Japanio, la raporto estis redaktita de membro de la Komisiono, s-ino Edvige Tantin Ackermann el Italio. Tria komisionano estas s-ro Povilas Jegorovas el Litovio.

La plej grandan atenton evidente altiras la kandidatoj por la nova Estraro, sed la raporto inkluzivas ankaŭ la kandidatojn por komitatanoj C, por komitataj reviziantoj kaj por la Financa Komisiono.

Laŭ la Elekta Regularo de UEA la Komisiono povis konsideri kiel validajn kandidatojn nur tiujn, kiuj antaŭ la fino de marto estis proponitaj de almenaŭ du nunaj komitatanoj el malsamaj landoj. S-ino Ackermann kritikis la komitatanojn pro pasiveco en la proponado de kandidatoj, pro kio la Komisiono ne povis transdoni al

la Komitato pli ol po unu kandidaton por la oficoj de prezidanto, vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario.

„Nia movado verŝajne ne estas preta por vera elekto-kampanjo kaj por konkuro interpersona”, estas la amara konkludo de Ackermann. La komitatanoj tamen povos fari efektivan elekton almenaŭ pri kvar ordinaraĵaj membroj de la Estraro, ĉar por tiuj lokoj estas ses kandidatoj. La Komisiono proponas, ke la nova Estraro havu entute sep membrojn, dum la nuna estas ok-kapa.

La sola kandidato por la prezidanteco estas d-ro Renato Corsetti el Italio, kiu do en Pekino ricevos ŝancon plu prezidi la Asocion ĝis 2007, kiam la Statuto postulus lin transdoni la martelon al iu alia. Ankaŭ s-ro Ivo Osibov el Kroatio, nun ĝenerala sekretario, estas proponata por reelekto, sed kun nova funkcio kiel vicprezidanto. Lia posteulo kiel ĝenerala sekretario estus s-ino Ulla Luin el Svedio.

Por la ceteraj kvar lokoj en la Estraro kandidatas s-ino Ans Bakker-ten Hagen el Nederlando, s-ino Maritza Gutierrez el Kubo, s-ino Claude Nurmont el Francio, prof. Amri Wandel

el Israelo, s-ro Andrej Grigorjevskij el Rusio kaj s-ro Yu Tao el Ĉinio.

Du el ili, Bakker-ten Hagen kaj Grigorjevskij, membras en la nuna Estraro. Por reelektado ne kandidatas la nunaj estraranoj Humphrey Tonkin, Lee Chong-Yeong, Gbeglo Koffi kaj Michela Lipari. Ĉar inter la kandidatoj estas kvar virinoj, estas do eble, ke en la sama kongresejo, kie en 1995 okazis la Monda Virina Kongreso de UN, unuafoje en sia historio UEA ricevos Estraron kun virina plimulto.

Antaŭ ol povi esti elektitaj kiel estraranoj, la kandidatoj devos unue elektigi komitatanojn. Tiun postulon jam plenumas Bakker-ten Hagen, Gutierrez, Nourmont kaj Yu Tao, kiuj en la supera organo de UEA reprezentos siajn landajn asociojn kiel komitatanoj A. Osibov kaj Wandel kandidatas en la balotado de la individua membraro pri komitatanoj B. Por la aliaj restas la ebleco fariĝi komitatanoj C, kiujn la komitatanoj A kaj B elektos „por certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj”, kiel difinas la Statuto de UEA. Se malpli ol sep estraraj kandidatoj iĝos komitatanoj, eblos proponi novajn kandidatojn en Pekino anstataŭ la elfalintoj.

Eĉ se sufiĉa nombro da estraraj kandidatoj estus elektita kiel komitatanoj, en Pekino tamen necesos trovi novajn kandidatojn, se en la Komitata voĉdonado pri la Estraro malpli ol sep kandidatoj el tiuj prezentitaj de la Elekta Komisiono akiros plimulton de voĉoj. Alia solvo estos elekti malpli

grandan Estraron.

La propono de la Komisiono elekti sep estraranojn ne devigas la Komitatanojn, kiun ligas nur la Statuta preskribo, ke povas esti entute 5 ĝis 9 estraranoj. Pri ĉiuj elektoj la Komitato devos decidi per sekreta baloto.



Krom la estraraj kandidatoj Corsetti, Grigorjevskij kaj Luin, por komitatano C kandidatas s-ro Josep Franquesa Sole (Hispanio/Katalunio), s-ro Paulo Branco (Belgio), s-ro Marcel Delforge (Belgio) kaj s-ino Loes Demmendaal (Nederlando).

Du el ili, Branco kaj Demmendaal, estas proponitaj ankaŭ por funkcii kiel komitatanoj reviziantoj dum la venontaj tri jaroj. Ankaŭ por tiu funkcio povas esti elektitaj nur komitatanoj. Tiu postulo ne koncernas la membrojn de la Financa Komisiono, por kies tri lokoj la komitatanoj povos elekti inter s-ro Ilja De Coster (Belgio), s-ro Marcel Delforge (Belgio), d-ro Gianfranco Polerani (Italio) kaj s-ino Flory Witdoeck (Belgio).

La plena raporto de la Elekta Komisiono kaj la biografieto, fotoj kaj motivigoj de la kandidatoj por la diversaj oficoj estas legeblaj en la TTT-ejo [www.uea.org](http://www.uea.org).



**„Libera Folio” pri la**

## **Elektoj en UEA**

**„Estas tempo por nova generacio”**

*Nia aŭtoro Zlatko Tišljar estis komitatano de UEA dum dudek jaroj. Li opinias, ke la esperantistoj fariĝas ĉiam pli malkontentaj pri sia gvidantaro. „Kial niaj estraroj daŭre ripetas la samajn planojn, kiujn ili uzis antaŭ kelkdeko da jaroj?“, li demandas, kaj proponas ke Renato Corsetti transdonu la gvidan pozicion en UEA al pli juna generacio.*

Lastatempe ĉiam pli oftas la diskutoj pri la neceso iom alidirekti la politikon kaj strategion de UEA, kiuj evidente malkontentigas ĉiam pli da membroj.

Kiel delonga esperantisto kaj homo kiu membris en la UEA-komitato dum 20 jaroj, samgeneraciano de la nunaj ĉefoj en la UEA-estraro, mi klopodos doni kelkajn sugestojn por eventuale plivigli la nunan argumentadon.

Mi mem plene konscias, ke nun ĉirkaŭas nin tute novaj cirkonstancoj — la erao de elektronikaj medioj. Tiu erao ne nur materie ŝanĝas nian vivon sed evidente influos al socia revolucio en la mondo (nepre devos ŝanĝiĝi en baldaŭa estonto la rilato al laboro kaj la kompleta interna strukturo de ŝtatoj).

La situacio efektive estas ege konvena por nia popolo, kiu ja vivas virtuale kaj trovis idealan manieron por esti kunligita per la reto. La E-popolo (tiu ĝia pli juna parto, kiu ja en ĉiuj popoloj portas la socian vivon kaj la efektivan funkciotaskojn) jam escepte bone

adaptiĝis al tiuj novaj kondiĉoj, kaj en la reto ni viglas pli ol iu ajn popolo (se oni rigardas ĉiujn servojn kiujn ni jam havas, ĉiujn forumojn, eĉ baldaŭ televidon — kompare kun la nombro de niaj loĝantoj).

Sed la rolo de tiu popolo en la mondo malpligrandiĝas pro la ŝajne nekontraŭstarebla ofensivo de la angla, antaŭ kiu jam kapitulacis preskaŭ ĉiuj ŝtatoj de la mondo. La popolanoj fariĝas ĉiam pli malkontentaj pri sia gvidantaro, ĉar ĉiu el ni sentas ĉiam pli la premon de la ekstero: „Kial vi okupiĝas pri tiu afero kondamnita al malsukceso?” Kial niaj estraroj daŭre ripetas la samajn planojn, kiujn ili uzis antaŭ kelkdeko da jaroj?

Mi persone vidas novajn celojn tre klare por la E-movado, sed mi ne trudas tiujn ideojn al aliaj. Kaj mi scias ke troviĝas novaj iniciatoj kaj eĉ submovadoj kiuj prezentas aliajn celojn kaj iniciatojn. Por trovi novan vojon inter la tradiciaj kaj novaj ofertoj estas necesaj novaj homoj. Tial mi sugestas al mia kara kaj estimata amiko Renato, ke li pripensu transdoni la gvidpozicion en UEA al pli juna generacio.

En la generacio de tridekelk-jaruloj, homoj kiuj aktivis en TEJO aŭ ankoraŭ aktivas, certe troviĝas sufiĉaj homoj, kiuj transprenus la taskon estraraniĝi en UEA. Tamen, kondiĉe ke la plimulto en la estraro estu iliaj samaĝaj kolegoj. Samkiel la generacio de Renato kaj Humprey havis historian signifon por Esperanto en la sepdekaj jaroj, tiel la generacio de la nunaj

# Por ke lingvo estu intertriba, ne sufiĉas nomi ĝin tia, oni devas ankaŭ instrui ĝin!

En la mondo, kaj en Afriko, oni multe parolas pri tribismo kaj pri la malbonaj sekvoj de tribismo, kiuj interalie estas malpaco, streĉitaj rilatoj kaj eĉ malferma milito. Ni provas helpi afrikajn landojn, en la kadro de samcelaj klopodoj de Unesko, venki tribismon.

Nia rimedo ŝajnas tre bona por permesi rektan interkontaktadon inter anoj de malsamaj gentoj en la koro de Afriko, kie militoj faris multajn viktimojn lastatempe. Nia projekto estas „Lingvo de paco — Ururimi rw'Amahoro”. Temas pri kampanjo, kiu celas kunligi esperantistojn el la malsamaj militantaj gentoj de Burundio, Ruando kaj Orienta Kongo (la tiel nomata regiono de la grandaj lagoj),



⇒ tridekkelk-jaruloj ekhavu la respondecon por la unua jardeko de la 21a jarcento.

Mi sugestas al la UEA-estraro kaj la CO komenci konsultadojn kun la Brusela Komunikadcentro, kun TEJO kaj eventuale kun iuj konataj gejunuloj nun sen funkcioj. Estraro en kiu estus 5 junaj kaj 2–3 pli aĝaj estraranoj signifus esperon por la nuna jardeko.

Zlatko Tišljarić

kiuj instruas Esperanton al siaj samgentanoj por organizi post unu aŭ du jaroj grandan intertriban, interetnan, kaj interlandan renkontiĝo de esperantistoj en Buĵumburo, Burundio.

Instruado de Esperanto jam okazas surloke. Nun aperis instruistino preta vojaĝi tien, ne sen personaj riskoj, ĉefe por instrui Esperanton pli bone al la instruistoj. Ni devas NUR pagi la flug-bileton kaj la ceterajn kunligitajn kostojn. Ni estas la Fondaĵo Espero, konto 'Lingvo de Paco' ĉe UEA, kiun vi jam multe subtenis en la pasinteco. Ni esperas, ke vi faros tion ankaŭ nun por ebligi ĉi tiun agadon.

Renato Corsetti

P.S.

Se vi sendas monon al UEA por la Fondaĵo Espero bonvolu klare mencii sur la pagilo „Fondaĵo Espero — Lingvo de Paco”. Pagmanieroj estas troveblaj en Jarlibro de UEA p. 33. Unu el la pagmanieroj estas:

Poŝtbankkonto 37 89 64, Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam.

IBAN: NL24PSTB0000378964 (kvar nuloj, ne majusklaĵ literoj O)

SWIFT: PSTB NL21

Mencio de IBAN kaj SWIFT kodoj permesas senpagan transkontigadon en Eŭropo.

## Vigla klubo en Afriko

En Buĵumburo, la ĉefurbo de Burundio, estas pluraj Esperanto-kluboj. Malgraŭ la konstanta militado en la regiono ili laboras por pli bona estonteco. Ili preparas nun kunvenon de esperantistoj de malsamaj triboj/genitoj/nacioj. UEA per sia programo „Lingvo de paco” (Ururimi rw’Amahoro) subtenas ĝin, tiom, kiom tion ebligas la membroj de UEA, kiuj donacas al la fondaĵo Espero/Lingvo de paco.



Unu el la kluboj de Burundio, gvidata de Jérémie Sabiyumva, B.P.150, Rumonge, sendis foton kaj raportis:

*En nia klubo estas ĉirkaŭ 30 gelnantoj. En nia lernejo estas multaj kluboj kaj la Esperanta klubo estas la nova. Je sabato la 24an de aprilo estis festo de la kluboj en nia lernejo kaj ĉiuj kluboj devis prepari ion. Ĉeestis multaj personoj: gepatroj, aŭtoritatoj de nia lernejo, gelnantoj. Nia klubo (Esperanto) preparis teatraĵeton en Esperanto. Dum la festo ni dancis kaj kantis.*

Kontribuojn por Fondaĵo Espero/Lingvo de paco („Ururimi rw’Amahoro”) vi povas sendi al UEA, Rotterdam, per la diversaj kontoj (vidu la

Jarlibron 2003 p. 33). Librojn en ne-grandaj pakajoj rekte al Jérémie Sabiyumva, B.P.150, Rumonge, Burundi.

Hans Bakker



## Ponto

Okaze de la oficialaj solenaĵoj pro la disvastiĝo de la EU orienten renkontiĝis je la 30a aprilo 2004, 16a horo, ĉ. 20 Esperanto-amikoj el Pollando kaj Germanio sur la urba ponto de Frankfurt (Odra). Kelkaj eĉ havis longan alvenvojon, ekzemple el Wschowa, Nowa Sól, Bytom Odrzański, Żary, Lubsko kaj Berlino. Neantaŭvidite nin salutis la ĉefurbestro de Frankfurt, s-ro Patzelt.

La planitan programon ni tuj forlasis post la renkontiĝo sur la mezo de la urba ponto kaj promenis laŭ la riverbordo preterirante homamasojn kaj atrakciojn kaj super la insulo „Ziegenwerder” al la hotelo „Zur alten Oder”. Tie ni interŝanĝis opiniojn pri la esproroj kaj duboj pro la historia paŝo de la disvastiĝo orienta, pri la sekvonta kunlaboro kaj ni komune kantis diversajn kanzonojn.

Poste ni revenis al la urba ponto. Ni uzis ĝin por viziti la najbaran urbon Ślubice. Intertempe ni disdonis al preterpasantoj faldfoliojn, kiuj informis pri celoj kaj konstruo de Esperanto. La vespero finiĝis per komuna manĝado kaj la deziro de baldaŭa revido.

Ronald Schindler (Frankfurt)  
alsendis: Andrzej Kiszkiel (Lubsko)

La 3an de aprilo kunvenis en feriejo/trejnejo „Sportzentrum Uckley”, parto de la vilaĝo Kablow Ziegelei, dekkelkajn kilometrojn oriente de Königs Wusterhausen, dek unu homoj el Brandenburgio kaj Berlino por intensiva Esperanto-kurso. Internaciigis la renkonton rumania kaj franca gepartoprenantoj kaj la duan tagon gastoj el najbara Pollando.

Dimanĉon, la 4an de aprilo, post matenmanĝo, dugrupa kurso kaj tagmanĝo ni bonvenigis kvin polajn gastojn speciale alveturintajn el sufiĉe malproksima Lubsko, Andrzej Kiszkiel, ties du filinojn kaj du genevojn, al kiuj li instruas Esperanton. Laŭplane fariĝis komuna babilrondo kun ili kursfina „ekzameno”, kiun ĉiuj partoprenantoj sukcese trapasis. Post kafumado kaj denova interparolado finiĝis la dutaga kurso je la 4a posttagmeze.

Philippe Beaudonnet (Berlino)  
alsendis: Andrzej Kiszkiel



### Estimataj redaktoroj,

Nome de la organiza komitato de Esperanto-Societo „Teslic” mi sendas al vi la tekston de la invito. Ĝi estu kiel eble plej baldaŭ publikigata ĉar la esea konkurso jam finiĝas fine de aŭgusto kaj la seminario estos komence de oktobro.

Esperanto-Societo «Teslic» el urbo Teslic (EST, Bosnio kaj Hercegovino), kunlabore kun Eŭropa Esperanto-Unio, organizos en venonta oktobro tritagan seminarion en Banja Vru-

ca apud Teslic sub la nomo TAMEN (Teslica Alvoko Moviĝi al Eŭropa Nacieco). Ĝi estas destinita al junuloj kaj junaj mezaĝuloj (ĝis 40 jaroj) el Kroatoj, Bosnio kaj Hercegovino, Serbio kaj Montenegro, Makedonio kaj Albanujo.

La programo enhavos interalie:

- a. Interkonatiĝo kaj individua perspektivo
- b. Kion ni atendas de Eŭropa Unio?
- c. La kulturo de niaj najbaroj kaj regionoj
- d. Organiziteco de EŬ
- e. Ĉu ni perdos nian suverenecon?

Alveno je ĵaŭdo, 7 de oktobro, en la bankuveja loko Banja Vrucica, hotelo „Kardijal” (3 km de Teslic). Foriro je dimanĉo, la 10a.

Kostoj de partopreno: 25 BAM (1 BAM = 0,51 eŭro). Viaj vojaĝkostoj estos duone rembursitaj.

Petu aliĝilon de EST, radolinka BB, BA-74270 Teslic, Resp. Sernba — Bosnio kaj Hercegovino, Tel+fakso: +387-53 436-572 aŭ rete tra est@teol.net.

La seminarion subvencias la nederlanda pacmovado IKV kaj Eŭropa Esperanto-Unio. Prepare al TAMEN ili invitas ĉiujn Eŭropajn gejunulojn en landoj, kiuj ne estas membroj de Eŭropa Unio aŭ kiuj ĵus aliĝis, donisian opinion en eseo aŭ ‘kolumno’ de minimume 200 kaj maksimume 500 vortoj, rilate al sekvaj demandoj:

La plivastigo de Eŭropa Unio je la 1a de majo per dek novaj membroŝtatoj estas grava nova paŝo en la procezo de Eŭropa integriĝo. Sed kun tio

la procedo ankoraŭ ne finiĝis! Bulgarujo kaj Rumanujo sin preparas por la membreco kaj ankaŭ la landoj de okcidenta Balkanio vidas sian estontecon — baldaŭ aŭ malpli baldaŭ — ene de Eŭropa Unio.

En lando kia Nederlando la interesiĝo pri centreŭropaj kaj orient-Eŭropaj landoj en penigaj transformiĝoj nun estas konsiderinde malpli granda ol antaŭ dek jaroj. La atento nun direktiĝas al enlandaj problemoj, al Irakujo, Meza Oriento kaj la batalo kontraŭ teroristoj. IKV deziras, dum la monatoj en kiuj Nederlando prezidas Eŭropan Union (julio ĝis decembro inkluzive) emfaze meti en la tagordon kelkajn aferojn, inter kiuj la problemon de ekonomia kaj socia integriĝo de landoj, kiuj suferis multe en la transform-procezo.

Tial IKV bezonas vian kontribuadon! IKV ankaŭ volas aŭskultigi vian voĉon en la debato. Tial ni invitas vin komenti al jenaj du tezoj:

1. Mia lando ja (devas aliĝi/ prave aliĝis) al Eŭropa Unio, sed ..... (sekvas konsiderado kiel via lando profitos aŭ malprofitos de Eŭ-membreco).

2. Mia lando (devas aliĝi / prave aliĝis) al Eŭropa Unio, ĉar..... (sekvas konsiderado kiel Eŭ profitos de membreco de via lando).

Kompreneble povas eniri multaj temoj: ekonomia evoluado, politika stabileco, kultura riĉiĝo, socia novigado, pli da eblecoj por Eŭropo en la mondo, ktp.

Sendu vian kontribuon antaŭ la 1a

de septembro al:

Johan Derks, Rietgors 40, 8271 GH IJsselmuiden, Nederlando.

Al la ensendintoj kelkaj interesaj Esperantaj libroj estos lotumataj. Menciui kiun libron vi ŝatus ricevi (ne pli ol 20 eŭroj), se vi gajnos.



## Pozitiva evoluo de la membraro en 2003

Kun 16978 membroj la statistiko de UEA denove turniĝis en kreskon en 2003.

La pasintjara membronombro superas per 716 la nombron de 16262 en 2002. La kresko ŝuldiĝas al plimultiĝo de aligitaj membroj. En 2003 la landaj asocioj pagis al UEA por 11264 membroj, dum en 2002 temis pri 10549. Inter la aligitaj membroj radikale kreskis la nombro de junaj membroj, kiuj konsistigas la aligitan membraron de la junulara sekcio TEJO. Kompare kun 1162 en la antaŭa jaro, en 2003 TEJO havis 1908 aligitajn membrojn. Tiu kresko tamen plejparte estas ŝajna, ĉar en 2002 multaj landaj asocioj ne indikis, kiom el iliaj membroj estis junaj.

Ankaŭ la nombro de individuaj membroj ĉesis fali. En 2003 UEA havis 5714 individuajn membrojn, kio signifas simblan kreskon de 1 membro kompare kun 2002, kiam la nombro estis 5713. Provizoraj informoj pri la evoluo en 2004 indikas, ke la pasintjara rezulto ne estis incidenta. La 20an de majo la Centra Oficejo registris jam

la 5000. membron, kiu kotizis por la nuna jaro. En 2003 oni atingis tiun limon nur fine de junio. Tio parte rezultas el pli efika administrado en la CO, sed temas ankaŭ pri efektiva kresko de la membraro.

En 2003 la konsisto de la individua membraro estis: Membroj kun Gvidlibro 375 (410 en 2002), Membroj kun Jarlibro 1197 (1099), Junaj Membroj kun Jarlibro 231 (235), Membroj–Abonantoj 2799 (2834), Junaj Membroj–Abonantoj 139 (161), Dumvivaj Membroj 843 (860), Junaj Dumvivaj Membroj 23 (18), Dumvivaj Membroj kun Jarlibro 26 (19), Junaj Dumvivaj Membroj kun Jarlibro 6 (5), Honoraj Membroj 65 (61) kaj Membroj de la Honora Patrona Komitato 10 (11).

La plej fortan bazon UEA havis en Japanio, kie el 1445 membroj 1069 estis aligitaj kaj 376 individuaj membroj. Sekvis Germanio kun 1231 membroj (resp. 682 kaj 549), Ĉinio 1180 (1050 kaj 130), Francio 1165 (564 kaj 601), Italio 1025 (821 kaj 204), Belgio 789 (641 kaj 148), Usono 721 (350 kaj 371), Brazilo 650 (246 kaj 404), Svedio 615 (400 kaj 215), Britio 569 (403 kaj 166) kaj Nederlando 536 (277 kaj 259). En 2003 UEA havis membrojn en entute 111 landoj.

Laŭlanda membrostadistiko troviĝos en la junia numero de la revuo „Esperanto”. Tie aperos ankaŭ detaloj pri la nombroj en diversaj membrokategorioj kaj en aliaj kotizkategorioj (Societo Zamenhof, Patronoj de TEJO, abonoj de la revuoj „Esperanto” kaj

„Kontakto”) en la jaroj 2001, 2002 kaj 2003.



## Pli ol 1500 kongresanoj registritaj por Pekino

La 21an de majo la 89a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino (24–31 julio) nombris 1506 aliĝintojn el 50 landoj. Plej multe da kongresanoj liveras la gastiganta lando Ĉinio, de kie jam venis 712 aliĝoj, inter ili 5 el Tajvano. Kun 161 aliĝintoj forte reprezentigas ankaŭ Japanio. Almenaŭ 10 kongresanoj enskribiĝis el Germanio (69), Korea Respubliko (51), Italio (42), Rusio (33), Nederlando (30), Usono (25), Kroatio (24), Svedio (22), Vjetnamio (21), Britio (19), Brazilo (17), Aŭstralio kaj Litovio (po 14), Svislando 13, Finnlando kaj Irano (po 11), Belgio, Hispanio kaj Kanado (po 10). [red.: Ĉu neniu polo aliĝis?]



## Nova reta Katalogo de UEA

Post plurmonataj preparoj estas malfermita por publika aliro la nova reta Katalogo de UEA:

<http://katalogo.uea.org>.

La nova Katalogo regule prenas la informojn el la datumbazo de la Libroservo de UEA kaj aŭtomate regulas ŝanĝojn en ĝi. Interalie, oni tuj vidas, ĉu iu libro estas havebla aŭ jam elĉerpiĝis.

La testintoj, partoprenintoj en la la-



sta etapo de la preparlaboroj, trovas ĝin oportuna kaj facila por la uzado. Oni laŭde mencias ankaŭ la aspekton de la Katalogo, kiu nun estas samstila kun la retejo UEA.ORG, kaj variajn serĉmanierojn, kiujn ĝi prezentas.

Oni povas serĉi la varojn ne nur per la titoloj, la aŭtoraj nomoj kaj kategorioj, sed vokinte „aldonajn serĉkriteriojn” ankaŭ per la titolo de la eldonejo, vortoj en la priskriboj, lingvo, eldonjaroj kaj eĉ intervaloj de paĝonombroj kaj prezoj.

Unika servo de la Katalogo estas reta abonejo por la perataj de UEA E-gazetoj. Plia grava oportunaĵo estas ebleco liste trarigardi la enmetitajn en la Katalogon recenzojn kaj fari serĉadon laŭ iliaj titoloj, aŭtoroj kaj la tekstoj.

La vizitantoj de la Katalogo povas mem kontribui al ĝia enhavo: aŭ per mallonga opiniesprimo, aŭ per propra recenzo por iu el la verkoj.

Bone ellaborita kaj amikeca estas ankaŭ la menda sistemo, kiu prezentas al la vizitantoj ĉiujn necesajn ciferojn, aŭtomate kalkulas rabatojn, impostojn kaj sendokostojn.

Restas kompreneble ankoraŭ multe da aldona laboro: momente en la Katalogo estas nur 20 recenzoj kaj nur tre malmultaj libroj jam havas bildeton de la kovriloj.

La Katalogon preparis Andrej Grigorjevskij. Helpis, konsilis kaj testis: Ionel Onet, Dirk Bindmann, Joost Witteveen, Trevor Steele, Osmo Buller, Renato Corsetti, Ziko Sikosek, Boris

Kolker, Claude Nourmont, Aleksandr Grishchenko kaj kelkaj aliaj.

Bonvenon por viziti, rigardi kaj uzi!



Karaj ŝatantoj de agrablaj renkontiĝoj! Kien iri somere? Ni proponas:

## SOMERE

### 2a Somera Mezeŭropa Renkontiĝo

Ĉi-jare en la mezmontara regiono Eifel, 40 kilometrojn sudokcidente de Bonn. Ni trovis domon kun ĉarma ĝardeno en Kall-Krekel, sudoriente de Akeno (inter Schleiden kaj Blankenheim).

La domo situas en bela ĉirkaŭaĵo kaj relative proksimas al la landoj, el kiuj venis la plimulto de la pasintjaraj eksterlandaj partoprenantoj — Nederlando, Belgio, Francio kaj Luksemburgio estas apudaj kaj ni sekve esperas, ke denove estos bele internacia renkontiĝo kun infanoj.

Pasintjare entute estis 34 homoj, inter kiuj 14 eksterlandanoj kaj 10 infanoj. Por la ĉi-jara SOMERE ni jam povis kolekti 8 aliĝintojn, el kiuj unu komentis:

„Mi ĝojas, ke vi denove sukcesis oferti la lastjare tiom agrablan renkontiĝon”.

La retaj informoj kun bildoj kaj aliĝilo troviĝas ĉe:

[www.EsperantoLand.org/somere](http://www.EsperantoLand.org/somere) .

## Naturo kaj kulturo

La programa skemo estos simila al la pasinta jaro: Ni havos lingvokurson en la komencaj kvin tagoj kaj estos prelegoj, ni faros promenojn kaj ekskursojn, ni ludos kaj babilos. Ni provos aranĝi ankaŭ iom da kultura programo kaj jam havas anoncon pri danca ateliero. Ĉu eble vi havas ideon, kiu muzikisto aŭ alia kulturulo ŝatos ferii en SOMERE? Dankon pro via helpo!

## Tranoktado en ĉambroj aŭ tendoj

Ankaŭ la aranĝo pri tranoktado kaj manĝoj estos simila al la pasinta SOMERE: Vi povos elekti, ĉu loĝi en la domo aŭ en tendo, ĉu manĝi grupe aŭ mem zorgi pri viaj manĝoj. Kompreneble via familio ankaŭ povos dividiĝi — eble viaj infanoj entuziasmos pri tendo kaj vi malpli...

## Por familioj, unuopuloj — kaj aliaj

La aĝogamo estos same vasta kiel pasintjare: de infanoj kaj dudekelkjaruloj ĝis sepdekjaruloj.

## Lerni Esperanton kaj tuj apliki

Ankaŭ ĉi-jare ni ofertas intensan kurson en la unuaj tagoj por ebligi la partoprenon al komencantoj kaj progresantoj. Ĉi-foje ĝi okazos de lundo, 26a de julio, ĝis vendredo, 30a. Tiel eblos kiel pasintjare en unu sama aranĝo rapide eklerni kaj tuj poste praktiki la lingvon en internacia medio.

## Memzorgado kaj tendumado

Se vi ŝatos, vi povos loĝi en tendo aŭ mem zorgi pri viaj manĝaĵoj — tio kostas multe malpli. Krome estas rabatoj por eksterlandanoj kaj programkontribuantoj (kaj por la donacantoj kaj kunlaborantoj de EsperantoLand).

## Venu SOMERumi kun ni!

Ĉu vi interesiĝas? Bonvolu baldaŭ reagi ĉe [www.EsperantoLand.org/somere](http://www.EsperantoLand.org/somere) — la tempo ĝis aŭgusto estas mallonga kaj ni tre ĝojus rapide havi almenaŭ bazan liston de partoprenantoj. Plian bildon de la ĝardeno kun la domo fone vi povas vidi sur la renkontiĝo-mapoj de EsperantoLand ĉe [www.esperantoland.org/renkontighoj/legrenkon.php?renid=390&R=13](http://www.esperantoland.org/renkontighoj/legrenkon.php?renid=390&R=13)

Amike

Lu Wunsch-Rolshoven  
EsperantoLand



## 15a Kongreso de Valecia Esperanto-Federacio

En la vilaĝo Cheste (provinco Valencio, Hispanio), kie Esperanto estas granda multjara tradicio, kaj kun granda helpo de urba registaro kaj gastamo de loĝantoj, okazis la 15a Kongreso de Valencia Esperanto-Federacio, la 29an kaj 30an de majo 2004.

Partoprenis reprezentantoj de la E-grupoj de Alicante, Castellón, Valencia, Oliva, ktp, kaj vizitantoj el Madrido, Francio kaj Nigero.

Gravaj eroj de la programo estis la kortuŝigaj omaĝoj al nia forpasinta samideano José María Bernabeu Franco, kaj al la elstara esperantisto de la urbo Cheste, Walter Máñez.

Prelegoj, koncertoj, E-kvizo, vizito al la rapid-cirkvito de Cheste (la plej moderna en la mondo), vizito al la lokaj vidindaĵoj, Ĝenerala Asembleo, prezentado de la filmo „La sieĝoj de Malbork” en sia Esperanta versio, produktita de Roman Dobrzyński, kaj fine, kiel jam tradicie en ĉiu aranĝo kiu okazas en la Valencia komunumo, gustumado de tipa „Paella”, invito de la urbestro.

Augusto Casquero



### **Polaj esperantistoj vizitas Valencion**

Okaze de vojaĝo al Hispanio, polaj geesperantistoj vizitis la sidejon de Grupo Esperanto de Valencia. Temas pri gesinjoroj Liberski el Poznań, kaj junaj esperantistinoj Barbara Liberska kaj Monika Sobania, ambaŭ studentinoj de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, de Bydgoszcz, kie tuta instruado okazas en la lingvo Esperanto.

Barbara Liberska estas ĉefa reorga-



nizanto de la praktike jam malaperinta Pola Junulara Movado, kaj ankaŭ nun organizanto de la vojaĝo por poloj por partopreni la internacian manifestacion kiu, sub la nomo „Eŭropa Bunto”, okazos la 9an de majo en Strasburgo (Francio) por defendi la lingvan diversecon en Eŭropa Unio.

Junaj valenciaj esperantistoj pristudis kun ŝi la eblecon pri kunlaboro inter polaj kaj hispanaj junuloj, interŝanĝi ideojn kaj projektojn, kaj resti en daŭra kontakto.

Augusto Casquero



### **Vojaĝo tra Centra Ameriko**

Internacia Klubo „Esperantotur” en Bydgoszcz kunlabore kun pola vojaĝoficejo „FLUGO” aranĝis dum 8 marto – 22 aprilo 2004 vojaĝon tra 9 landoj de Centra Ameriko.

La unua etapo okazis en Meksiko dum 8–20 de marto dum kiu ni vizitis Meksiko-urbegon kaj historiajn ĉirkauaĵojn, sekve pacifikajn kurortojn Acapulco kaj Puerto Escondido kaj de tie daurigis vojaĝon tra Oaxaca, Palenque, Chitzen Itza kaj Cancun.

Dum 20–27 de marto ni vizitis la 6an Tutamerikan Kongreson de Esperanto en Kubo (6 TAKE), kiun partoprenis pli ol 180 esperantistoj el 21 landoj de Ameriko, Eŭropo kaj Azio. La plej elstara estis la Nacia Kuba Vespero, dum kiu oni konatiĝis kun pluraj nuntempaj kant kaj dancensembloj kiuj agas ĉe Kulturdomoj de Havano.

Dum la dua etapo du grupetoj vizitis Kubon — krom Havano, Valle Vinales, Zapata duoninsulon kun krokodiloj, kolonian urbon Trinidadon kaj faman ripozlokon Varadero kun apudaj grotoj Bellamar.

Al la tria etapo aliĝis pliaj partoprenantoj kaj ni revenis al Cancun en Meksikio de kie jam surtetre daurigis la vojaĝon tra 9 landoj de Centra Ameriko.

Dum 46-taga vojaĝo ni veturis buse pli ol 8000 km kaj dum 35 taga pli ol 5300 km. Post Cancun ni vizitis ankoraŭ unu majan urbon en Meksiko — Tulum kaj daŭrigis ĝis Chetumal.

Post aranĝo de vizoj por Belize sekvis vojaĝo tra tiu lando al Belize City kun marekskurso al Caye Colker por vidi la duan la plej grandan en la mondo koralbarilon. De Belize City ni vojaĝis al Gvatemalo al lago Flores de kie al la plej granda maja mezepoka urbo — Tikal kun 7 fortikaĵoj. Sekvis busetvojaĝo al Honduro al Copan Ruinas, kiuj de sudo fermas teritorion de mezepokaj majaj urboj. De Copan ni revenis al Gvatemalo kaj daurigis al Gvatemala Antigua — la malnova ĉefurbo de Gvatemalo kun belega kolonia arkitekturo.

Ĉiuj volonte ŝipekskursis tra belega lago Antitlan kun rigardoj al tri gvatemalaj volkanoj kaj vizito en indianaj vilaĝoj kaj fama urbeto Panajachel.

En nuna ĉefurbo Gvatemala City oni vizitis ne nur la grandan urbon, sed necesis aranĝi salvadorajn vizojn. Tio permesis viziti la ĉefurbon El Sal-

vador kaj ekskursi laŭ historia itinero vizitante iliajn arkeologiajn setlejojn kaj la plej faman Tuzmal, gustumi ankaŭ tie lokajn manĝaĵojn kun juko kaj viziti Salvadorajn lagojn kun nebula arbaro. De Salvadoro ni revenis denove al Honduro al la ĉefurbo Tegucigalpa, kie eblis konatiĝi kun religiaj kutimoj de Sankta Semajno i.a. belegaj sablaj tapiŝoj kaj apudan Nacian Parkon La Tigra. De Tegucigalpo ni busveturiss rekte al Managuo — la ĉefurbo de Nikaragvo, de kie per luita buseto al interesa funkcia volkano Masaya. Ĝi bedaŭrinde famas de tio, ke indianoj ĵetadis al volkankratero junajn virgulinojn honore al dioj kaj ek-sa diktatoro Somoza ĵetadis de helikopteroj liajn politikajn malamikojn. Denove impresis belega kolonia arkitekturo de malnova nikaragua ĉefurbo — Granada.

Buse ni daŭrigis al urbeto Rivas, de kie ŝipe al monto Ometepe sur lago Nikaragua, kie imponas du grandaj volkanoj. De Nikaragua ni vojaĝis al la oka lando de Centra Ameriko — al Costa Rica. Ni haltis por du noktoj ĉe Pacifika Okeano en belega golfo Playa El Coco, kie eblis ŝipekskursi por vidi martestudojn kaj delfenojn same kiel en meksika Puerto Escondido. Sekvis busvojaĝoj tra belegaj kostarikaj montaroj apud lago kaj funkcia volcano Arenal, por haltigi en turisma urbeto La Fortuna.

Fine ni atingis la ĉefurbon San Jose. En San Jose varmege akceptis nin Guido Hernandez Marin kun sia edzino.

Ni ankaŭ vizitis malnovan ĉefurbon Cartago, kie ili ambaŭ instruas en Teknologia Instituto. Impresis tie Baziliko, kiu estas la plej fama katolika pilgrima centro en Costa Rica. Ni estis akceptitaj ankaŭ en nova domo de Hugo Mora Poltronieri, kiu instruas Esperanton en Universitato de San Jose. Vojaĝante jam al la naŭa — la lasta lando de Centra Ameriko — Panamo nia buso haltis survoje en Sud-Kostarika urbo San Izidoro el General, kie neatendite renkontis nin ĉe la busstacidomo tuta familio de Carlos L. Salazar Alvarado, kiuj regalis nin per kukoj kaj refreŝigaj trinkaĵoj. Evidentiĝis, ke Costa Rica havas ne nur riĉajn marbordojn, sed ĉefe riĉkorajn esperantistojn. Certe valoras okazigi internacian simpozion en tiu belega lando por promocii Esperanto-turismon. Costa Rica estas multekosta por eksterlandaj turistoj, sed esperantistoj certe kapablos aranĝi relative malmultekostan vizitadon.

En Panamo tempo permesis viziti nur faman Kanalon ĉe kluzoj Miraflores, la belan malnovan ĉefurbon Panama City kaj historiajn ruinegojn en Panama Vieja.

Fine riĉaj je multegaj impresoj kaj travivaĵoj ni revenis el Centra Ameriko al Eŭropo por prepari sekvontajn vojaĝojn.

**Andrzej Grzębowski**  
Internacia Klubo „Esperantotur“



## Malferma Tago la 20. fojon

Sabaton, la 24an de aprilo la Centra Oficejo en Roterdamo plenis ne nur pro gastoj de la Malferma Tago. La estraranoj de UEA komencis en dimanĉo 3-tagan kunsidon sed venis jam pli frue por havi okazon renkontiĝi kun vizitantoj de la 20a Malferma Tago.

Eksredaktoro de la revuo „Esperanto” Istvan Ertl kaj movad-historiistino Zofia Banet-Fornalowa estis la ĉefgastoj. Ertl prezentis la libron „Ĉu nur-angla Eŭropo?” de la renoma socilingvisto Robert Phillipson. Ĝia Esperanta eldono, en traduko de Ertl, estis lanĉita en la Malferma Tago. Ĝi ankaŭ estis elirpunkto por du podiaj diskutoj, en kiuj la tradukinton apudis prezidanto Renato Corsetti, vicprezidanto Humphrey Tonkin kaj universitata lekciisto Wim Jansen. S-ino Banet-Fornalowa prelgis dufoje: pri la vivo de Lidja Zamenhof, kies 100an naskiĝdatrevenon oni omaĝas ĉi-jare, kaj pri la aktuala stato de la Esperanta historiografio.

Kun 75-kapa ĉeesta merkato la libroservo de UEA vendis dum la tago varojn por 2739,21 eŭroj. La plej furora libro estis la novaĵo de Phillipson, kun 9 ekzempleroj. Du propraj verkoj de Istvan Ertl okupis la sekvajn lokojn: poemaro „Provizore”, ankaŭ lanĉita samtage, kaj la satira romaneto „La postdomo”, kun resp. 7 kaj 6 vendoj. La nova PIV trovis 5 novajn posedantojn. Inter la diskoj plej popularis

„Esperanto–literaturo” (10 ekz.) kaj la novaĵo „Prezidantoj de UEA” (6 ekz.) el la serio „Tiel sonis...” de historiaj sondokumentoj.



## Tiel sonis... Prezidantoj de UEA

### 68 jaroj sur unu kompaktdisko

En la serio „Tiel sonis...” UEA prezentis ĝis nun la inaŭguron de la UK 1977 en Rejkjaviko kaj kompiladon el la Esperanta literaturo. La tria, plej nova kompaktdisko enhavas la voĉojn de iamaj prezidantoj: Privat, Malmgren, Canuto, Yagi, Lapenna, Tonkin, Maertens, Wells.

De Edmond Privat (1927) ĝis John Wells (1995) ŝanĝiĝis la movado, la mondo, kaj ankaŭ la tekniko. Por la UK en Danzig Privat enigis fajroplanan deklamon en la maŝinojn de la Berlina firmao Tri Ergon, kiu eldonis reklamcele sondiskon kun Esperanto–paroladoj. Du generaciojn poste Wells parolis mikrofone al la kongreso eĉ ne sciante ke la kongresejaj kunlaborantoj registras ĉion.

Malmultaj rememoras la voĉon de Giorgio Canuto, kies nomon havas la UEA–fondaĵo kiu membrigas homojn en malriĉaj landoj. La sondokumento aŭdigas lin ĉe la UK 1958. Multe pli konata certe estas Ivo Lapenna.

Paroladon de li UEA registris en 1964, por sondisko. Dek jarojn poste la Magnetofona Servo de R. Eichholz

kaptis la Fermon de la Hamburga kongreso, kiam Humphrey Tonkin prezentis la nove elektitan Estraron.

La festparolado de John Wells en Tampere 1995 ricevis specialan atenton, ĉar Wells superrigardis ne nur siajn kvardek jarojn de esperantisteco, sed rememorigis ankaŭ pri du „pioniroj”: Privat kaj Lapenna. Ĝuste la lastan, laŭ Wells, la movado ne ĉiam traktis konvene.

„Tiel sonis...” estas serio de kompaktdiskoj, kiujn Ziko M. Sikosek kompilis el materialoj konservataj en Biblioteko Hector Hodler de UEA. Kvara kaj lasta ero verŝajne temos pri la Universalaj Kongresoj. La prezo de unu disko estas 9,90 eŭroj (plus imposto de 19% por klientoj en EU kaj la sendokostoj).

Gazetaraj Komunikoj de UEA



Czesław Baranowski

## Preskaŭ ĉio pri la prepozicio ĜIS

La prepozicio **ĝis**, same kiel la prepozicioj **al**, **de**, **el**, apartenas al la grupo de **senakuzativaj prepozicioj**. La diferenco inter **al** kaj **ĝis** konsistas en tio, ke **al** indikas nur direkton, dum **ĝis** fiksas ankaŭ la limon.

**Ekz.:** Li iris **al** la stacidomo (li iris en la direkto de la stacidomo). Li iris **ĝis** la stacidomo (la stacidomo estis la limo, **ĝis** kiu li iris). Oni ne povas tamen diri: Li iris **ĝis** sia amiko por premi lian manon.

Ni facile rimarkas, ke **ĝis** montras la limon (punkton), kiun la ago atingas, sed ne trans- aŭ preterpasas ĝin. Por pli bone kompreni tion mi preparis por vi multajn frazojn kun praktika uzado de tiu ĉi prepozicio.

*1. La prepozicio ĝis montranta limon en la spaco:*

Li akompanis ŝin **ĝis** la taksiejo. Post varma adiaŭa kiso ŝi ruĝiĝis **ĝis** la oreloj.

Mi pretas vojaĝi kun vi **ĝis** la fino de la mondo. Aktorino kliniĝis antaŭ spektantoj **ĝis** la tero. En Mielno ĉiu facile povas trovi vojetojn **ĝis** la strando.

De Koszalin **ĝis** Mielno estas tre proksime. Per mara akvo li plenigis

sian botelon **ĝis** la rando. Gelernantoj ofte biciklas **ĝis** la lernejo. **Ĝis** kie ni iru hodiaŭ vespere? Ni iru **ĝis** la lago, ĉar **ĝis** la arbaro estas sufiĉe malproksime.

*2. La prepozicio ĝis montranta limon en la tempo:*

Mi laboras ĉiutage de frua mateno **ĝis** malfrua vespero (post malfrua vespero mi ne plu laboras). Gelernantoj lernas de lundo **ĝis** vendredo kaj la lecionoj okazas de la 8a **ĝis** la 14a. La interkona vespero daŭris **ĝis** noktomezo. Mi promesis al ŝi fidelecon **ĝis** la morto. De parolo **ĝis** faro estas tamen tre malproksime.

**Ĝis** hodiaŭ mi scias nenion pri via peto, sed mi certe plenumos ĝin **ĝis** la fino de aŭgusto. Mi respondos vian leteron **ĝis** dimanĉo. Zamenhofa ideo akompanas la lingvon internacian Esperanto de ĝia naskiĝo **ĝis** la nuna tempo. Pasintsemajne mi malsanis kaj **ĝis** nun turmentas min malagrabla tusado. La fundamenta kurso de Esperanto daŭris **ĝis** Pasko-festoj.

Ni tre ofte uzas **ĝis** en la esprimoj: **Ĝis** (la) revido! (aŭ **Ĝis** (la)!), **ĝis** tiam, **ĝis** nun.

### Rimarkoj:

a) La prepozicio **ĝis** povas esti uzata ankaŭ en la funkcio de konjunkcio:

Soldatoj iris rapide **ĝis** fine ili tute malaperis. Hieraŭ vespere mi legis **ĝis** mi endormiĝis. Mi atendas tiel longe **ĝis** vi estos preta por la vojaĝo. Ni batalos por nia ideo tiel longe, **ĝis** ĝi plene efektiviĝos.

b) Pri la daŭro de la ago oni povas demandi per **ĝis kiam**, ĉar oni antaŭe ne scias, ĉu la respondanto difinos la tempon de la daŭro per tempopunkto aŭ per daŭro–fino.

**Ekz.:** **Ĝis kiam** vi intencas resti en Varsovio? (...**ĝis** sabato). Skribu al mi **ĝis kiam** vi estos okupita pri la renovigo de via domo? (...**ĝis** semajnfino).

**Rimarko:** Ni memoru tamen, ke uzi **ĝis kiam** anstataŭ la subjunkcia **ĝis** estas senutila pleonasmo, kiun nenio pravigas. Sufiĉas uzi nur **ĝis**.

**Ekz.:** Mi atendas vin tiel longe, **ĝis** vi plenumos vian laboron.

### 3. La prepozicio **ĝis** esprimanta la mezuron aŭ gradon:

L. Zamenhof simpligis Esperantan gramatikon **ĝis** nekredobleco. Li ofte sidis en laboroj **ĝis** super la oreloj. Ŝi eltrinkis kalikon da konjako **ĝis** la fundo. Mi povas toleri vian impertentecon nur **ĝis** certa grado. La domoj en la urbocentro havis tri **ĝis** kvar etaĝojn da alto. Ĉiu ĉambro en tiu–ĉi hotelo povas akcepti du **ĝis** tri personojn. La kunvenintoj estis en la aĝo de 20 **ĝis** 50 jaroj.

### Rimarkoj:

a) La prepozicio **ĝis** (same kiel prepozicioj **ĉirkaŭ**, **inter**, **po**, **super**) povas stari eĉ antaŭ numeralo de subjekto: La kunvenon ĉeestis **ĝis** dudek esperantistoj.

La prezo de benzino plialtiĝis jam **ĝis** kvar zlotoj.

b) La prepozicion **ĝis** oni ne uzas kun negacio en la senco „**tiel longe, kiel...**”, sed korekte oni diras: Ni ne foriros, **ĝis** oni nin forĵetos, **aŭ**: Ni ne foriros **dum** oni nin **ne** forĵetos. (**Neniam oni diras**: Ni ne foriros, **ĝis** oni nin **ne** forĵetos!).

Ankaŭ neniam oni diras: Mi ne atendas tiel longe, **ĝis** la problemo **ne** estos solvita, **sed oni devas diri**: Mi ne atendas tiel longe, **ĝis** la problemo estos solvita.

4. La prepozicio **ĝis** estas tre malofte uzata en la funkcio de prefikso: **ekz.:** Malmultaj homoj **ĝis**vivas cent jarojn. En Mielno oni povas facile **ĝis**siri la maron.

Mi intencas morgaŭ **ĝis**fini mian laboron. Mi ne povas **ĝis**atendi vian alvenon.

Li **ĝis**morte batalis kontraŭ malfacilaĵoj kaj ne **ĝis**vivis la edziĝon de sia filo.

**Korekte uzataj frazoj:** Ni **ĝis**is unu la alian (ni diris unu al la lia **ĝis** la revido).

Ni dancis **ĝis**matene, poste sekvis kisoj kaj **ĝis**oj.

El la *Proverbaro Esperanta* pri-laborita de Ludoviko Zamenhof mi



## 29 Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz

Tradicie en Bydgoszcz dum 23 de aprilo ĝis 2 de majo okazis laŭvicaj 29 Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz, ĉifoje kune kun 25 Sesio de AIS Klerigejo Bydgoszcz (AKB). La E-tagoj daŭris kadre de Tagoj de Bydgoszcz dum 19 aprilo-3 majo 2004 okaze de 658 datreveno de urbaj rajtoj de Byd-



⇒ elektis denove kelkajn proverbojn speciale por vi:

- Atendis, meditis, **ĝis** en tombon englitis.
- Atendis, atendis, **ĝis** lin ĉerko etendis.
- De parolo **ĝis** faro estas tre malproksime.
- Li vidas nur **ĝis** la pinto de sia nazo.
- Li sidas en ŝuldoj **ĝis** super la ŝultroj.
- Fidanta al vorto atendas **ĝis** morto.
- Ĝemu kaj ploru, sed **ĝis** fino laboru.
- Komenca inklinado daŭras **ĝis** la fino.
- De majesta **ĝis** ridinda estas nur unu paŝo.
- Longe ĉerpas la kruĉo, **ĝis** ĝi fine rompiĝas.

goszcz — nun kun preskaŭ 400 mil loĝantoj. Tio lige ankaŭ kun multaj aranĝoj okaze de eniro de Pollando al Eŭropa Unio donis al partoprenantoj amason de interesaj aranĝoj. Tamen por pli ol 50 gestudentoj el 10 landoj de Eŭropo, Afriko kaj Azio de ISTK en Bydgoszcz la plej gravaj estis E-kursoj kaj E-ekzamenoj. Ĉi-foje kursojn gvidis OProf. Remigiusz Mielcarek pri Karaiboj, Suda Ameriko kaj Sudorienta Azio, AProf. Aleksandra Kowalczyk gvidis Seminarion por estontaj bakalaŭroj kaj magistroj de AIS, Asci Augusto Casquero pri „Hispanio en Eŭropa Unio”, Asci Ewa Bondar pri „E-instruado laŭ Cseh-metodo”, Asci Regina Grzębowska „Kompendio por vojaĝgvidantoj”, Asci Andrzej Grzębowski pri „Turismo en la mondo”, Marcel Delforge pri „Plilarĝigo de Eŭropa Unio”, kaj pri „Esperanto kaj franca lingvoj”, Mara Timermane pri „Latvio en Eŭropa Unio”, Moliere Ngangu pri „Turismo en Afriko”, Adriana Witucka pri „Arta ceramiko”. Ĉiuvespere okazis E-ekzamenoj por gestudentoj de laŭvicaj studjaroj, kiuj estis altnivelaj kaj ege interesaj kiam gestudentoj el 8 landoj: Albanio, DR Kongo, Latvio, Litovio, Mongolio, Pollando, Tanzanio kaj Zimbabvo defendis siajn diplomverkojn antaŭ la ekzamenkomisiono el 6 landoj: Belgio, Hispanio, DRKongo, Litovio, Latvio

kaj Pollando, prezentante ne nur bonan konon de Esperanto, sed interesajn diplomverkojn pri turismo kaj kulturo. Okazis ankaŭ fakekzameno de AIS, kiun partoprenis 15 kandidatoj por septembre bakalaŭriĝi kaj magistriĝi ĉe Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS).

Fine de la E-kursoj gvidataj pri Eŭropa Unio okazis konkursa ekzameno kun premioj — senpagaj vojaĝoj al 14 Eŭropa Esperanto-Forumo dum 11–18 de junio 2004 en Beneluxo kaj Parizo kun vizito en sidejo de Eŭropa Unio en Bruselo.

La 30an de aprilo okaze de eniro de novaj 10 landoj al Eŭropa Unio, Augusto Casquero de la Cruz preparis por ĉiuj la faman valencian „paella” kun „sangrija”. Poste ĉiuj vagadis tra Malnova Urbo por spekti la aranĝojn de Tagoj de Bydgoszcz. Bonguste estis preparita rekorde en 37 mil da porcioj senpaga regiona supo „Żurek Kujawski”, kies ĉefa kuiristo estis Konstanty Dombrowicz — Prezidento de la Urbo Bydgoszcz, samtempe prezidanto de nia Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz, pri kiu Vi povas multon legi en Interreto sur pli ol 100 paĝoj sub adreso: [www.esperanto-turismo.com](http://www.esperanto-turismo.com).

La 26an de aprilo okazis ankau Ĝenerala Kunveno de Internacia Klubo „Esperantotur”, dum kiu oni resumis la ĝisnunan agadon, planis aranĝojn por 2005 jaro kaj reelektis la 11-personan Konsilion de la Klubo sub gvido de prezidanto Andrzej

Grzębowski (PL) kaj vicprezidantoj Augusto Casquero (ES) kaj Liu Jian-guo (CN) — pliaj informoj en la paĝo: [www.esperanto-turismo.com](http://www.esperanto-turismo.com).

La 29an de aprilo en tre agrabla etoso pasis renkontiĝo aranĝita de nevidantaj esperantistoj en Bydgoszcz.

Fine la 2an de majo okazis la Ĝenerala Kunveno de Pola Societo de AIS, kiun dum pluraj jaroj gvidis ADoc Zbigniew Galor en Poznań. Kiel la novan Prezidanton de Pola AIS-Societo oni elektis OProf. Witold Stępniewski — Vicrektoron de Politekniko en Lublin.

La sukcesa 25 Sesio de AKB helgis, ke pluraj gestudentoj aliĝadis al sekvontjara studado, aliĝadas ankaŭ novaj sudentoj — la plej multaj el Afriko kaj Azio. Pliajn informojn — la aliĝkotizojn por studado en ISTK en Bydgoszcz kaj AIS, la studadprogramojn kaj enketilon por novaj studentoj Vi trovos en Interreto sub kelkdekpaĝoj: [www.esperanto-turismo.com](http://www.esperanto-turismo.com), elektu kaj kliku „studu”.

Bonvenon en Bydgoszcz al la unika multnacia studado 2004/2005 ĉefe en Esperanto de turismiko kaj kulturo — Vi studos jam en Eŭropa Unio.

**Andrzej Grzębowski**

Vicprezidanto de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz, Pollando



## Ĉefa Estraro kunsidis en Pelplin

Dimanĉe la 10an de majo 2004 la Ĉefa Estraro de PEA renkontiĝis en pitoreska nordpola urbeto Pelplin. Urbeto konata pro sia katedralo kaj tombo de episkopo-esperantisto Konstantyn Dominik. La kunsido estis la unua post la marta elekto-kunveno en Łódź.

El 9 persona estraro en pelplina kunsido partoprenis 7 estraranoj. Krom diversaj diskutitaj problemoj ligitaj kun organizaj kaj financiaj aferoj oni informis pri esperantistaj aranĝoj organizotaj en Pollando. Unu el la plej gravaj punktoj de la programo estis oficiala decido pri akcepto, aŭ fakte re-akcepto, de Pola Esperanto-Junularo al la strukturoj de PEA, kiu post multaj jaroj reaktiviĝis.

Lige kun tio oni informis, ke la estraro de TEJO akceptis la proponon de junaj polaj esperantistoj organizi venontjare Internacian Junularan Kongreson en Zakopane, Pollando.

La Ĉefa Estraro decidis honorigi per la distingo „Merita Esperantisto” du personojn:

s-ron Edward Kozyra kaj s-inon Danuta Staniek-Gutowska. Ambaŭ estas tre konataj en esperantista medio en Malbork kaj helpas promocii Esperanton en tiu regiono.

Eksterordinara fakto estis, ke la kunsidon partoprenis s-ino Halina Gorecka, kunredaktorino de konata monatrevuo „La Ondo de Esperanto” kaj

s-ro Etsuo Miyoshi, kiu intencas konstrui en Malbork fabrikon kaj subteni la agadon de esperantistoj.

Halina informis pri eldonplanoj de sia revuo kaj pri situacio de E-movado en Kaliningrada regiono. Kun s-ro Etsuo oni preparolis la kunlaboron, kiu efektiviĝos interalie per tutpaga informo pri Esperanto en tutpola gazeto „Rzeczpospolita”, kiu aperos fine de septembro.

La Ĉefa Estraro decidis ke tiu numero de la gazeto estos transdonita al ĉiuj novelektotaj polaj Eŭroparlamentanoj.

Krome estis preparolitaj aferoj ligitaj kun plifortigo de promocio de Esperanto en lernejoj surbaze de novaj libroj kaj lernomaterialoj, preparitaj de eldonejo „Hejme”.

Al la Nova Estraro de PEA ni deziras fruktodonajn kunsidojn.



## Magistriga disertacio pri la ekumena E-movado (finfine) defendita

Saluton!

Ĉiujn kiuj helpis al mi dum miaj klopodoj, kun grandega plezuro (kaj kun granda malmodesto, hmmm...) mi informas, ke mi finfine defendis mian magistrigan tezon titolitan „Esperantista ekumena movado. Skizo historia-teologia”, ricevante pro ĝi la neordinaran noton „tre bona kun distingo”.

Mi volas ankoraŭfoje ege danki pro

ĉiu helpo, kiun mi ricevis, kaj informas, ke specialaj, dulingvaj, dankvortoj por ili troviĝas ankoraŭ je la unua paĝo de la verko.

Kun salutoj

Katarzyna Tempczyk –  
la freŝa magistro de teologio

[red] Ni kore gratulas al Kasia kaj atendas la E-version de ŝia disertacio, certe eldoninda...



## La Konsulo inter la kandidatoj al la Eŭropa Parlamento

La Konsulo de la Esperanta Civito prof. d-ro Walter Ŝelazny troviĝas en la listo de kandidatoj al la Eŭropa Parlamento en la regiono Podkarpacie (sudorienta parto de Pollando): en la listo n-ro 12 (ĉiuj listoj estas 17) sur la 6a pozicio. La n-ro 12 estis atribuita en Pollando al la partio Unia Wolności (Unio de la Libereco).

La partio Unia Wolności grupigas grandparte antaŭajn intelektulojn kontraŭstalinismajn, ligitajn kun Lech Wałęsa kaj Solidarność; la plej fama inter ili estas prof. Bronisław Geremek.

La 1an kaj la 2an (ripeto) de junio 2004 c-ano Ŝelazny estis intervjuita de la ŝtata regiona radio Rzeszów (3 milionoj da potencialaj aŭskultantoj).

Dum la intervjuo li parolis pri la manko de la lingva politiko de la

Eŭropa Unio, pri la neceso juste trakti la problemojn de la lingvo kaj kulturo. Li esprimis esperon, ke pli kaj pli da deputitoj estos konsciaj pri la lingva ĥaoso de la Eŭropa Unio kaj ke ekde nun, rezulte de la pligrandiĝo de EU je 10 novaj ŝtatoj, la koncerna parlamenta komisiono okupiĝos pli profunde pri la lingva demokratio laŭ la logiko lanĉita de la italaj radikaluloj.

Praktike ne burokratoj, eĉ ne Eŭropaj deputitoj, sed la «Europa popolo» je la nomo de kiu oni kreis la Eŭropan Union, bezonas komunan lingvon.

Laŭ c-ano Ŝelazny trovi solvon de ĉi tiu problemo estas la morala devigo de la Eŭropaj parlamentanoj.

fonto: Heroldo Komunikas

## ... Małgorzata Handzlik

Lastmomente, antaŭ la presado de la revuo, venis informo, ke Małgorzata Handzlik (edzino de konata E-bardo Georgo), ankaŭ esperantistino, kandidatas al la EP el la listo de Platforma Obywatelska.



## Władysław Burszta

### Aldone al „Punkto. Fino!” (PE 2/2004)

Verdan Rozon mi portis sur miaj manoj dum la 44a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio en la jaro 1959, kiun ŝi partoprenis kun

ŝiaj gepatroj kaj miaj amikoj. Mi ti-  
am parolis Esperante, sed malrapide,  
serĉante ĝustajn vortojn, sed ŝi, la in-  
fano, parolis jam flue kaj bele en Es-  
peranto. Ŝi estis edukita per Esperanto  
kaj por Esperanto. De frua juneco ĝis  
matura aĝo, ŝi agis tre aktive por Es-  
peranto, precipe en Budapeŝto. Fine,  
ŝi elĉerpiĝis, eble eĉ kabeiĝos, kio min  
tre malĝojigus!

Tio okazas al tre ideaj esperantistoj,  
seniluziigintaj pro apatio kaj pigreco  
de aliaj „samideanoj”, aŭ pro aliaj ne-  
favoraj okazintaĵoj. Ili perdas pacien-  
con, esperon, kaj ne vidas celon de  
plua agado por la ideo, fine eĉ kabeas,  
kelkiuj laŭte, publike, kelkiuj diskrete,  
mallaŭte foriras de Esperanto (de Es-  
peranto–movado) pro preskaŭ infan-  
eca senpacienco kaj malespero pro  
manko de videblaj rezultoj pri la pro-  
greso de Esperanto, ofte ĉefa celo de il-  
ia agado. Tio al mi ne okazos. Mi ha-  
vas fortajn konvinkojn, ke Esperanto  
realigas celojn de neŭtrala, internacia  
lingvo por uzo kaj bono de la homaro.

Mi aprezas la problemon el historia  
vidpunkto. Multaj saĝaj, noblaj homoj  
kaj filozofoj jam de longa tempo labo-  
ris pri la ideo de internacia lingvo. Ili-  
aj projektoj ofte eĉ ne komencis vivi, aŭ  
rapide formortis pro ne ĝis fino bone  
prilaborita koncepto. Sed la fakto, ke  
aliaj denove komencadis krei plibo-  
nigitajn konceptojn atestas, ke la prob-  
lemo ĉiam estas aktuala. Nur Zamen-  
hof kreis koncepton, kiu komencis vivi  
per sia propra vivo kaj vivas ĝis nun.  
El ĵetita de li lingva ĝermo elkreskis

post jaroj dank’ al pluj uzantoj matu-  
ra kaj nature vivanta lingvo.

En la mondo okazis diversaj peri-  
odoj, dum kiuj regis internaciaj  
lingvoj. Plej konata estas la lingvo la-  
tina, kiu dank’ al Roma Imperio estis  
uzata kaj regas pli ol mil jarojn. Tiun  
ĉi lingvon akceptis ankaŭ la romkato-  
lika eklezio kaj dank’ al ĝi latina ling-  
vo, jam post disfalo de Roma Imperio,  
estis uzata kaj regis pluajn mil jarojn,  
ne nur en eklezio, sed en universitatoj  
kaj inter edukitaj homoj.

Sed tio ankaŭ finiĝis. Hodiaŭ lig-  
vo latina estas uzata ĉefe en liturg-  
iaj preĝoj, en ekleziaj dokumentoj,  
sed ne estas plu vaste uzata inter ho-  
moj. En hodiaŭa mondo estas neeble  
organizi ian grandan internacian kon-  
ferencon helpe de latina lingvo. Eĉ se  
iu preleganto relegus pli frue skribi-  
tan referaĵon, la partoprenantoj de tiu  
konferenco verŝajne komprenus ĝin ne  
pli ol turkan predikon. Kaj neimageb-  
la estas libera diskutado en latina ling-  
vo pri programaj temoj pere de parto-  
prenantoj.

Eĉ en la romkatolika eklezio, pri kio  
konvinkiĝis kardinalo Wyszyński dum  
la Dua Vatikana Koncilio, ne povinte  
interkompreniĝi latine kun kelkaj kar-  
dinaloj, ŝajne estis dirite, ke la sekvan  
koncilion oni devas organizi en Espe-  
ranto. Mi ne estis tie, kaj mem tion ne  
aŭdis, sed tiaj klaĉoj cirkulas inter es-  
perantistaro. Povis io ebla okazi — en  
ĉiu fabelo estas iomete da vero.

Kontraŭe, la lingvo Esperanto es-  
tas uzata en la mondo apenaŭ pli ol

unu jarcento, sed ĉiujare okazadas en la mondo multaj kunvenoj, grandaj konferencoj kaj eĉ kelkmilpersonaj mondaj kongresoj, dum kiuj ĉiu partoprenantoj aŭdas oficialajn referaĵojn, libere diskutas, disputas, eĉ kverelas en Esperanto.

Sed pri tio ne volas scii politikistoj, kiuj decidas pri gravaj mondaj aferoj. En la mondo oficiale regas la angla lingvo, konforme al la usona „paca” imperiismo. Nun regas mondo de la angla lingvo. Sed observante la situacion el la historia vidpunkto kaj en historia perspektivo, por ĉio venas iam fino, ankaŭ por imperiisma usona agado, kaj por regado de la angla lingvo.

En Oriento jam komencas ĝermi kaj kreski nova potenco — Ĉinujo — kaj verdire malnova, ĉar kiam Eŭropo vivis ankoraŭ en barbareco, en Ĉinujo jam floris alta kulturo, tiom longe ĝis eŭropanoj (ĉefe britoj) komencis ekspluati kaj detrui ĝin (opia milito), ŝajnigante helpon.

Sed malgraŭ tiuj egaj ekspluataĵoj kaj detruoj, en deknaŭa jarcento la ĉina ŝtato ekstaris sendependa, kaj ĉiam fortiĝas. Nun apartenas al nukleaj potencoj. Ĉu tio plaĉas al ni aŭ ne, ĉu ni volas aŭ ne volas allasi tian penson, Ĉinujo fariĝas monda potenco kaj iam rolas kiel ĉefa kaj decida potenco en monda ekonomio kaj politiko. Eble tiam ankaŭ por Esperanto okazos pli bonaj ŝancoj ol nunaj. Supozeble ĉinoj ne stos tiel malprudentaj devigi la mondon por lerni la ĉinan lingvon, analogie al tio, kio okazas hodiaŭ, kie

je ĉiu paŝo oni reklamas, rekomendas kaj postulas konon de la angla lingvo, por havi laboron kaj iun ajn signifon kiel homo.

Paranteze mi informas, ke ĉinoj ĉiutage elsendas per Ĉina Radio disaŭdigojn en Esperanto, kaj nunjare okazos tie la Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, certe kun kelkmiloj da partoprenantoj.

Tio estas miaj malproksimaj revoj, ne por mi sed por estontaj generacioj. Tiuj revoj permesas al mi vivi kun optimismo kaj ne kabei.



## Lernejaj Eŭrokluboj

Bonvolu legi la informon de Edward Wojtakowski pri Lernejaj Eŭrokluboj kaj fokusi la atenton je la suba demando:

„Eble ankaŭ aliaj esperantistaj societoj povus anonci sian helppretecon?”

Bogdan Dembiec

La retejon „Eŭroponto” vizitas ĉiutage 50–100 personoj (plej multaj vizitantoj devenas el Pollando, Ĉeĥio kaj Litovio). Mi faris paĝon „Laborplano de Junularaj (Lernejaj) Eŭrokluboj” (modelo) kun jena teksto:

- Partopreno en agado entreprenata de lernejo, komunumo, ŝtataj aŭtoritatoj, neregistaraj organizoj ligitaj kun la eŭropa movado (debatoj, konferencoj, diskutoj, seminarioj,

publikaj festenoj, ekspozicioj).

- Kolektado, ordigado kaj aktualigado de prieŭropaj dokumentoj kaj informoj (ankaŭ pere de interreto).
- Organizado de konkursoj pri Eŭropo.
- Eldonado de propra bulteno (murgazeto) kaj redaktado de propra retejo.
- Organizado de renkontoj kun interesaj homoj ligitaj kun la eŭropa movado.
- Organizado de naciaj vesperoj dediĉitaj al unuopaj landoj aŭ regionoj de Eŭropo.
- Lernado de la internacia lingvo Esperanto kaj eŭropaj etnaj lingvoj.
- Prilaboro de genealogia arbo de sia familio kaj fondo de familia (genta) kroniko.
- Prilaboro de retpaĝo pri sia urbo, komunumo aŭ regiono.
- Pristudo de turismaj valoroj de sia regiono, instigado de gepatroj kaj konatoj okupiĝi pri agroturismo, prilaborado de agroturismaj retpaĝoj en diversaj lingvaj versioj.
- Kunlaboro kun aliaj eŭrokluboj.
- Organizado de vizitoj (interŝanĝo) kun aliaj landaj kaj eksterlandaj kluboj.
- Sendado de bondeziroj al aliaj kluboj okaze de eŭropaj kaj naciaj festoj.
- Amikaj kontaktoj kun samaĝuloj el landoj de la Eŭropa Unio.

Mi faris ankaŭ paĝon: „Partneraj neregistaraj societoj”, en kiun mi volus aperigi adresojn de societoj, kiuj

ŝatus kunlabori kaj helpi lerneajn eŭroklubojn, ĉu oni povas skribi jene:

Subaj neregistaraj organizoj (senprofitaj societoj) estas pretaj helpi junularajn (lernejajn) eŭroklubojn:

- Silezia Esperanto-Asocio (tradukado de retpaĝoj el la pola en Esperanton kaj el Esperanto en la polan lingvon) — sea@europonto.org.
- Silezia Genealogia Societo (konsultado je temo „kiel konstrui genealogian arbon de la familio”) proponatan leterkeston sea@europonto.org mi ankoraŭ ne instalis. Eble ankaŭ aliaj esperantistaj societoj povus anonci sian helppretecon?

Mi daŭre kompilas adresliston. Estas 4800 lerneaj eŭrokluboj en Pollando. Mi esperas fini tiun laboron ĝis la 1a de majo.

Kun salutoj

Eduardo



### **Estimata redaktoro de PE,**

Mi sendas al vi reago-leteron, petante publikigi ĝin en via revuo.

Koregan antaŭdankon pro via konsento!

**J. Ŝemer (Tel-Avivo)**

Mi deziras reagi je la artikolo de R. Dobrzyński „Aktualeco de la Zamenhofa penso”, aperinta en PE, decembro 2003.

En ĝi la verkinto manipule uzas kelkajn diraĵojn de LLZ, dum li malatentas aliajn, kontraŭajn. Tion ĉi li ler-

te faras por pravigi tute fikciajn, de li kreitajn teoriojn pri la rilatado de Zamenhof al Cionismo (la nacia Movado de la juda popolo) kaj al la estonta juda ŝtato kaj pri iu „eventuala–hipoteza” (profeta...) mondkoncepto de Zamenhof pri la Barilo (nomata de RD „Murego”), kiun la israela ŝtato konstruas nun por ŝirmi sin kontraŭ envenantaj teroristoj.

Dobrzyński elĉerpis de la libro de la fama zamenhofologo N.Z. Maimon nur tiujn citaĵojn de Zamenhof, kiuj kvazaŭ ŝajnigas, ke dum certa periodo li kontraŭis Cionismon. Sed kial li ne aperigas aliajn, pli postajn citaĵojn kaj atestojn, kiuj pruvas ke LLZ parolis tre varme pri sia popolo kaj pri la Cionismo klarigante, ke „enkore li estas cionisto, sed ke lia pozicio en la Esperanto-movado ne permesas al li esti aktiva cionisto” (p. 110 en „La Kaŝita Vivo de Zamenhof”, Maimon, 1978).

Nu, vere: kia ligo estas inter la kontraŭterora Barilo konstruata nun de Israelo, la Berlina murego kaj... la muroj de miljaroj kiuj forte staras en la zamenhofa „La Espero”?

Karaj legantoj, komprenu: kiam verkisto, despli se li estas ankaŭ artisto, volas pruvi sian propran „pitorreskan” teorion, tiam ĉio estas permezata, ĉu ne? ♣



### Saluton!

Mia nomo estas Klaus Krieger, kaj mi loĝas en Bytom, Supra Silezio. Antaŭ nelonge mi aliĝis al la Po-

la Esperanto Asocio, Urba Filio en Bytom. Mi estas germano, kaj mi loĝas en Pollando ekde 1992. Mi ĉi tie instruis la germanan lingvon en la Germana Instituto de la Silezia Universitato en Sosnowiec, kaj nun mi jam estas pensiulo.

Mi kore deziras ke la enkonduko de la internacia helplingvo por la tuta homaro estu decidita post nelonge, kaj ke tiu lingvo estu Esperanto. Certe ŝajnas al mi, ke Esperanto ankoraŭ eblas esti iomete plibonigita. La estonta internacia lingvo devus esti la plej bona, plej elaborata, plej taŭga lingvo kion oni povus imagi.

Mia adreso:

ul. Dworcowa 23 /4, 41-902 Bytom;  
retpoŝto: klauskrieger@poczta.onet.pl



### Saluton!

Mi studas historion. Temo de mia ĉi-jara seminario en la universitato estos „Judaj Getoj en Varsovio, Vilno kaj Minsko”. Jen, la docento diris, ke ĉiuj povus elekti la temon de la porhejma laboro laŭ ilia plaĉo.

Kompreneble porhejma tasko kun 15 ĝis 20 paĝoj devus okupiĝi ne nur pri du aŭ tri personoj. Unue mi pensas, ke mi bezonas multajn librojn. Ĉu vi pensas, ke estas multaj? Mi malkovris, ke la bibliografio enhavas unu titolon, kiu nomiĝas „La vivo de Lidia Zamenhof”.

Mi pensas, ke mi bezonas informojn pri la Esperanto-movado en Pollando (Litovio, Belorusio) inter la



unua kaj la dua mondmilitoj, dum la dua mondmilito kaj post la dua mondmilito.

La manero de la materialo ne gravas: poemoj, rakontoj, historiaj libroj, dokumentoj de la administracio kaj tiel plu. Mi mem povus veni al Varsovio ĉi-somere. Kore,

Stephan Mayer  
Stephan-HD@gmx.de



### Karaj gekolegoj!

Antaŭ nelonge mi kaptis la okazon plu informi pri nia kara lingvo. Mi multe vojaĝas, kiel verŝajne ni ĉiuj. Ĉiutage mi uzas mian aŭtomobilon. Kial ne informi pere de ĝi pri ESPERANTO?

Tial mi produktis (kun helpo de mia amiko) subilojn por la registrotabuloj kun Esperanta temo. Bonvolu rigardi kiel tio aspektas en mia aŭtomobilo:



Ili estas preparitaj laŭ eŭropaj normoj. Se Vi volus ricevi tiujn subilojn por Via aŭtomobilo bonvolu kontakti min retroŝte: staman@esperanto.pl

Du subiloj rektangulaj (por la antaŭa kaj malantaŭa parto de aŭtomobilo) por Viaj oficialaj ŝtataj tabuloj kostas NUR 5 eŭrojn plus sendokostoj.

Amike kaj samideane

Stanisław Mandrak

## La kruela morto denove batis nian pardon...

Eminenta kaj amata **Waldi (Walerian) Baumgart** mortis la 18an de aprilo 2004, post 93-jara vivo, kies grandan parton dediĉis al Esperanto. Li amis nian lingvon, same kiel amis tutan homaron. En propra hejmo li fondis klubon „Amikeco”, organizis multajn kursojn kaj diversajn renkontiĝojn, li estis aktiva ĝis fino.

Kun profunda tristo post grandega perdo informas

Estraro de Internacia Centro pri  
Kulturo kaj Turismo  
gestudentoj de Internacia  
Studumo pri Turismo kaj Kulturo  
kaj geomikoj de Internacia  
Klubo „Esperantotur” el  
Bydgoszcz, Pollando



En Piekary Śląskie mortis en majo 2004, 90-jara, malnova kaj aktiva membro de bytoma esperantistaro

kol. **JÓZEF KAUCZOR.**

Ni kondolencas al familianoj kaj geomikoj.



## Responde al s-ro Władysław Burszta (PE 1/2004)

Mi asertas, ke Johano Paŭlo II apogas Esperanton. Jen pruvo:

— trifoje semajne oni povas aŭdi la E-elsendoj de Radio Vaticana;

— Esperanto ĉeestas en bibliaj legaĵoj de la latinlingva Meso;

— Centro de Dokumentado pri Pontifikado de Johano Paŭlo II eldonas E-bibliografion sub titolo „La Papo Johano Paŭlo II en esperantaj publikaĵoj”;

— La Papo montris favoron al esperantistoj jam kiel kardinalo. Jen Liaj vortoj: „Unu kredo kaj unu amo helpu al vi unuigi la disbatitan mondon en unu ŝafaron sub unu Paŝtisto. Unu supernacia lingvo — Esperanto — ankaŭ servu efike al ĉi tiu nobla celo” (Ĉenstohovo 1977 j.);

— La Papo diris al esperantistoj benante E-standardon en Rimini (29an de aŭgusto 1982 j.): „Mi benas vian standardon kaj vian agadon”;

— Novembre 1984, dum aŭdienco en Klementa Salonego en Vatikano la Papo, ekrigardante insignon de lodza pilgrimgrupo kaj Esperantan steleton, diris: „Esperanto... Dio benu vin”;

— En 1990 la Apostola Seĝo aprobis la liturgian tekston de Sankta Meso en Esperanto;

— Renkontiĝo de la Papo kun junularo en Ĉenstohovo 1991:

„Mi donas ankaŭ en Esperanto bonvenan saluton al la junaj pilgrimantoj el la tuta mondo, en ĉi tiu tago de universala frateco, kiu vidas nin unuigitaj

kiel filoj de unua sama Patro”;

— „Mi ĝojas bonvenigi la respondeculojn de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, engaĝigitajn en sia 50. Kongreso. Karegaj, la temo de via renkontiĝo reprenas la misian taskon konfiditan de Kristo al sia Eklezio. Akceptu ĝin malavare kun tiu spirito de universaleco, kiu estas ĉe la bazo de la lingvo, kiun vi kulturās”.

Per tiuj ĉi vortoj bonvenigis Papo Johano Paŭlo II ĉeestantojn de 50a IKUE Kongreso en Romo (la 3an de septembro 1997, sur la Placo Sankta Petro).

Ĉu necesas serĉi aliajn pruvojn?

**Zofia Barańska, Łódź**

La citaĵoj devenas de la libro de Krystyna Macińska: *Esperantaj vojetoj renkontiĝas en Romo*, Romo 2001.

PS. Mi estas kontenta, ke mi decidis aboni la revuon. Ĝi enhavas multe da interesaj artikoloj, informoj (nur unu ne plaĉis al mi). Mi salutas s-ron redaktoron, kiun mi vidis en Gliwice kaj en la Liceo Zamenhof en Lodzo.

- **La Sankta Biblio** — nova eldono kun duakanonaj (katolikaj) libroj estas aĉetebla en Eldonejo HEJME. Prezo (egalvaloro de) 13,30 EUR + sendokostoj. Tiu ĉi prezo koncernas nur aĉetantojn de ekssocialismaj landoj.
- **Maciej Zgondek, Iĝu esperantisto! Samouczek języka esperanto.** Speciala oferto por junularo: dum junio-aŭgusto prezo 16,00 zł + sendokostoj. Por kursgvidantoj, kiuj mendas 10 aŭ pli ekz., prezo 14,00 zł.

Efraim Kiŝon

## La simpla prirabo de banko

La afero komenciĝis, ĉar V. donis al mi la ĉekon je 16 pundoj, pagotan en la banko Leumi, la filio de Abu Kabir. Tien mi veturis kaj donis la ĉekon al la kompetenta oficisto. Li rigardis la ĉekon, la konton de V. kaj diris: „Ĉio estas en ordo. La monon vi ricevos en la kaso”.

Mi iris al la montrata fenestro kaj diris: „Ŝalom!”

— Kion vi deziras? — demandis kasisto.

— Monon — sincere mi respondis.

— Tre bone — diris la kasisto kaj prenis el la sekura monŝranko aron da monbiletoj, por doni al mi.

— Kion ĉi tio signifas? — mi demandis.

— Mi plenumas vian postulon. Ĉe rabatako per armilo, mi havas la instrukcion por ne oponi.

Mian ridegon li ne komprenis.

— Ha, ha, ha — li imitaĉis min. Tre ridinda ĉi tio estas, ĉu? Ĝi estas la kvina rabo en ĉi tiu monato.

Mi penis klarigi, ke mi havas nenion armilon kaj volas nur mian monon.

— S-ro Singero! — vokis la kasisto alian oficiston sidantan ĉe la apuda skribotablo. — Bonvolu veni!

*La batalo kontraŭ inflacio estas principa okupo de nia financa estraro. La registaro donas rigorajn instrukciojn, elpensas novajn impostojn kaj prenas de bankoj iliajn tro grandajn profitojn. Helpas en tio Izraela popolo per nunmodaj bankaj rabatakoj.*

Supozeble la gangstero estas iom mense lezita.

S-ro Singero aliris la fenestron portante grandan, banderolitan pakaĵon da monbiletoj.

— Hodiaŭ ni pli ne havas. Vendrede, kiam oni estos pagantaj salajrojn estos pli da mono. Krom tio, kial vi ne havas ŝtrumpon sur la kapo?

— Ĉar ĝi tiklas min — mi respondis.

Estis stranga kaj malagrabra situacio. Ĉirkaŭe ariĝis gapuloj, kiuj palpebrumis al mi, kriis ĉiuj kune. Iu kuris al la pordo,

malantaŭ kiu atendis lia edzino.

— Infanojn! Rapide! Venigu la infanojn! En la banko estas rabatako...

La aro da monbiletoj kreskis antaŭ mi, klariganta al s-ro Singero, ke mi ne intencas preni ĝin.

— Prenu, prenu! — kuraĝigis min s-ro Singero. — Ni estas asekuritaj.

Poste mi eksciis, ke en la pasinta semajno du malgrandaj knabinoj prirabis la bankan filion en Jafo. Oni sciigis Singeron, ke estas supozata atako en la banko Abu Kabir. De tiu momento s-ro Singero atendante la atakon kolektadis pli kaj pli da mono.

— Tio apartenas al la ĝusta priseruvo de klientoj — diris li kun iu fiero.

Ni prilaboris la regulojn de la racia procedo dum atako por niaj klientoj. Ĉio okazas laŭ tiuj reguloj.

Fakte, la klientoj, kiuj troviĝis en ĉi tiu momento en la banko, kuŝis sur la planko kaj en tiu ĉi pozicio estis priservataj de oficistoj. Poste ili rampis al elirejo kaj novaj klientoj same rampis al la banko.

— Iam raboj okazadis laŭ la pli teda klasika rito. Gangsteroj estis maskitaj, pafis por timigi la homojn, kriegis, minacis. Nun ĉio okazas pli racie, tial bankoj apreciante tion, apogas la modernajn metodojn.

Laste du banditoj armilitaj nur per ŝraŭbtirilo, prenis el la banko en R. cent mil pundojn. En filio de nia banko en Petach Tikva oni montris nur la beban suĉilon. Tio sufiĉis. Hieraŭ aperis la anonco de la diskonta banko en Hajfo: „Nia banko petas, ke raboj en la somera sezono okazu nur lunde, merkrede, jaŭde”.

— For burokratismon! — mi murmuris.

— Vi malĝuste opinias tion — respondis s-ro Singero. — Tio ĉi estas grandioza atingo pri kiu Herzlo eĉ ne kuraĝis revii. Ni fine havas proprajn kriminalistojn. Fine ni estas normala popolo.

— Betino, ĉu vi jam vokis policon? — demandis Singero sian sekretariinon.

— Mi provis, sed la numero estas okupata — ŝi respondis maĉante gumon.

— Lasu tion! — diris Singero.

Nombrante la monon mi demandis kial ĉi tie estas neniuj alarmsistemoj.

— Pro la bruo — li klarigis. — En la banko Hapoalimo dum la lasta atako la alarmsistemo sonis la tutan horon. Imagu kiom forte la oficistoj estis ŝokataj!

— Kie estas la armilitaj gardistoj? — mi plu demandis.

— Ie ekstere. Je ĉi tiu horo nia direktoro promenas kun siaj hundoj. La gardistoj devas lin gardi.

Intertempe la kasisto estis pakanta la monbiletojn. Li demandis, kie mi parkis la ŝtelitan aŭton per kiu mi intencas forkuri. Kiam ni eliris el la banko ĉirkaŭis nin gapularo. Multaj volis foti min. Ili petis, ke mi kovru la vizaĝon kaj ne faru stultajn mienojn. Ĉe la fino de la strato oni vidis kelkajn policistojn starigantajn barikadon. Mi disdonis kelkajn aŭtografojn kaj provis la lastan fojon redoni la valizetojn kun la mono. Singero ne permesis.

— Ne, ne. Ni jam sciigis nian centralon. Asekura Asocio ankaŭ venos kaj redonos al ni la perditan monon. Bonvolu eviti komplikajojn! Nur, se vi volus atendi momenton ĝis alveturo de televido...

— Bedaŭrinde, sed mi ne havas tempon — mi adiaŭis Singeron per la amika manpremo kaj forveturis al la plej proksima benzinstacio.

— Kiom? — demandis la servanto.

— Plenigu! — mi respondis.

La servanto malfermis mian багаĝujon kaj ĵetis en ĝin ĉiun monon, kiun li posedis.

— Ĉu vi bezonas kvitancon? — mi demandis.

— Dankon, ne. Mi estas asekurita.

Kia domaĝo estas, kia domaĝo — mi pensis — ke en nia lando nun estas inflacio. Kiam ni fine estos normala popolo?

el la jida lingvo tradukis polen  
Stanisław Lewański

el la pola lingvo tradukis  
Danuta Kowalska